

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


Germanio: Kiel trovi merkaton por ideo



Orellana Rojas: Post plurjara vago, posteno en Hago



La sekreto de sukceso: Internacia Festivalo



Montpeliero arkitektas por ni

Enhavo

- 21 Tutmonde: Etoso festa, solena, intima (Zamenhof-tagaj raportoj)
- 22 Kampanjo 2000: Germanio: Ideo trovas merkaton (Frank Stocker); Landaj asocioj ekkampanjas; Esperanto aŭ IHL? (Bernhard Westerhoff)
- 25 Nia kongreslando: Montpeliero montras multajn facetojn (Jeannine Bony); Vivejo preskaŭ ideala (Rikardo Cash); La katarisma herezo (André Cherpillod); La okcitana lingvo (Daniel Pfeiffer)
- 26 Kotiztabelo DE UEA por 1998
- 31 Aranĝoj: Revenu al via vilaĝo! (Renato Corsetti); ...Kaj kio pri la IS?
- 32 Instruado: Pilgrimo ĉe jarmil-fino (intervjuo kun Atilio Orellana Rojas); Libro de kaj pri Andreo Cseh; La domo en Hago
- 33 Duobla konferenco omaĝe al Wüster
- 34 Recenzo: *Ekstremoj* (Mauro Nervi)
- 35 Laste aperis
- 36 Reagoj: Ne plezuriga *Heroldo* (Gian Carlo Fighiera); Fakaj asocioj fruktodonaj (Germain Pirlot); Aludo misflanken (Éric Coffinet); Danke al regulemo (Franz-Georg Rössler); Meritoj emfazindaj (Ulrich Matthias); Ŝulco nin adiaŭas (Helmar Frank) La poeto morta (Rikardo Ŝulco)
- 37 Fake
- 38 Persone
Oficiala Informilo
- 39 Anoncetoj
- 40 Loke
Nekrologoj

Vi trovos

sur la kovrilo de ĉi tiu numero la ciferon 1100: nu, ĝi estas malpli ronda, malpli jubilea ol 1000, tamen impona, ĉar egala al 100 teoriaj jarkolektoj de po 11 numeroj...

Ludante plu kun numeroj, ni facile venas al 2000: nome, Kampanjo 2000 denove ĉeftemas. Ĝi inspiras du artikolojn (p. 22-24), reagojn de du kunagemaj asocioj: unu landa (la germana) kaj unu faka (de bahaanoj).

Per sep fotoj ĉiĉeronino Jeannine Bony invitas vin promeni tra nia kongresurbo Montpeliero, kaj la bildojn flankas kleraj artikoloj de André Cherpillod kaj Daniel Pfeiffer rilataj al nia kongresa regiono (p. 25-30).

Nekutime longan leteron de leganto vi malkovros inter "Reagoj" (p. 36), pri la sorto de *Heroldo de Esperanto*. Ni iom hezitis publikigi la fortajn asertojn de Gian Carlo Fighiera, sed fine la zorgo pri periodaĵo tiel grava por nia komunumo kiel *Heroldo* decidigis nin loki ĉi tiun proteston de homo kun 36-jara sperto pri tiu gazeto.

La kovrilo: Konstruaĵo en la kvar-talo Antigone de Montpeliero, verko de la historiema postmodernisto Ricardo Bofill. (Foto de J. Bony)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ☎+82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ✉mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ✉A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ✉mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ✉amri@vms.huji.ac.il.

Etoso festa, solena, intima

Dum la legado de la suba “protokolo” pri iufoje rutinaj, alifoje malpli kutimaj manieroj festi la Zamenhofan tagon en diversaj landoj, nepras konstati: kia ajn la aranĝo, ĝi estas evento kiu rolas formade kaj koherige por la lokaj Esperanto-komunumoj. Aparte atentindas ĉi-okazaj kunlaboroj kun aliaj sociaj movadoj aŭ kun institucioj, kiel ekz. en Brazilo, Irlando aŭ Kroatio.

Aŭstrio: Radia vizito

25-kapa vizitanto kvin-nacia konatiĝis kun Radio Vieno la 13-an de dec., gvidate de Katinjo Fetes-Tosegi, estro de la E-elsendoj el Aŭstrio. Posttagmeze sekvis la tradicia solenaĵo en la Domo de Pola Kulturo. (*Eventoj*)

de diplomoj al kursfinintoj, kaj informoj de Francisco Mattos de Oliveira (vicprez. de Brazila E-Ligo) pri E-atinĝoj en Brazilo kaj tutmonde en 1997. Fine eĉ alvenis e-ista Paĉjo Kristnasko: Amarílio Hevia de Carvalho. (L. Venicio, R. Resende, Interredaktore)

Sekvis Zamenhof-vespero en la Pola Instituto, i.a. kun la filmo *Korczak* de A. Wajda kaj kantoj de Anjo Amika.

Oni festis en la pedagogiaj altlernejoj de Sárospatak — kie regiona televido filmis solenaĵon de la E-studentoj — kaj en Szombathely, kie bildkarantoj, senditaj de kursanoj de Katalin Smidélusz el 26 landoj, pruvis la tutmondecon de E-o. (*Eventoj*, O. Princz)

Interretujo: Kultura superbazaro

Ĉar la 15-a de dec. estas ankaŭ Tago de la Esperanta Libro, Flandra E-Ligo kaj la Interret-peranto Agora malfermis tiutage la unuan Esperantan

Hispanio: Sunbrilo en Sabadell



En Sabadell — kie troviĝas la plej alta Esperanto-monumento en la mondo — Kultura Asocio Esperantista kunvenigis la 14-an de dec. 49 samideanojn por florkrona omaĝo, en sunbrila vetero.

Belgio: La log-povo de historio

La 13-an de dec. oni unuafoje Zamenhof-festis en Kelmis, ĉefloko de la iama (1816-1919) teritorio Neŭtrala Moresnet. Per tio reaktiviĝis la tiutempa (1906-14) E-kunveno Bergerhoff, nun nomata Select. Lokaj e-istoj, kun Mathieu Schrymecker ĉekape, atentigas instancojn pri la turisma log-povo de la loka historio, inkluzive la provon krei la E-ŝtaton Amikejo. (T. Sinno)

Brazilo: Paĉjo Kristnasko

Ekde 1993, de kiam Kultura E-Centro en Goiânia aŭspicias, kun aliaj E-organizaĵoj, “Zamenfeston”, ĉiujare plinombriĝas la ĉeestantoj. La 20-an de dec. la programeroj eksterordinare abundis: skeĉoj, muzikaĵoj, klaŭnoj, profesoro de joko, reprezentantoj de la komunumoj bahaa, spiritisma, kristnisma k.m.a., lanĉo de la E-lingva komputil-ludo *La ruĝa planedo* kaj de libro pri aidoso portugale, disdono

Ĉinio: Nederlanda volontulo

En Wuhan la Hubei-a E-Kongreso (20 dec.), aranĝita la 14-an fojon, unuafoje gastigis alilandanon: la 28-jara nederlandano Jasper Sprengers laboras volontule en la porinstruista instituto Xian-ning. (Jariĉ)

Germanio: Tri etaĝoj

Vojmontriloj necesas por sesdeko da festantoj en Berlino, ĉar paralela programo diskuta, luda kaj komputa disvolviĝis en disaj ejoj sur tri etaĝoj de lerneja konstruaĵo. (*Berlina Informilo*)

Hungario: Busto al universitato

Hungaria E-Asocio donacis al la Esperanto-fako de Universitato ELTE marmoran Zamenhof-buston, verkon de e-istino Boglárka Csuka. Inaŭguris ĝin HEA-sekretario Oszkár Princz, ĉeeste de 25 personoj, i.a. Tamás Gecső, ĉefo de la lingvistika katedro, kaj E-fakestrino Zsuzsa Varga-Haszonits.

“retsupermarkton”, kiu estas reta inform- kaj mendo-servo de libroj, diskoj, kasedoj, komputilaĵoj, filatelaĵoj ktp: <<http://esperanto.agoranet.be/supermarkto>>. (FEL, Interredaktore)

Irlando: Dank’ al Amnestio

En Tullamore la Zamenhof-Tago estis unuafoje solenita iom frue: la 6-an de dec., kadre de la Tago de Homaj Rajtoj, ĉar la lokan filion de Amnestio Internacia kunordigas esperantistino. En la publika kunveno aŭdiĝis prelegoj pri lingvaj rajtoj kaj pri la signifo de la Zamenhof-Tago, pri rajtoj de virinoj, nomadoj kaj t.n. “primitivaj” popoloj. En la ĉefa prelego du gastoj el Orienta Timoro reliefigis la situacion en tiu insulo aneksita de Indonezio. Ĉeestis gazetara fotisto kaj ĵurnalisto de loka gazeto. La publiko ne estis tre granda sed montris simpatian kaj intereson pri la afero. (G. MacAoidh)

(daŭrigo sur p. 31)

Germanio:

"GEA 2000" de germanaj esperantistoj jam en 1991 iel heroldis Kampanjon 2000 — ili povas do des pli aprobi ĉi tiun.

Lasciate ogni speranza o voi ch'entrate ("Ĉiun esperon lasu ĉe l' enpaŝo") — tiun tekston ni legas en la *Dia Komedio* de Dante (*Infero*, tria kanto; trad. K. Kalocsay). Sed ne! Ni lasos nek la esperon nek Esperanton enirante la novan jarmilon!

UEA ĝustatempe alvokis al nova kampanjo, vidalvide al nova jarmilo. Kampanjo 2000 estas bona iniciato por kolekti la movadajn fortojn cele al la tri gravaj celoj "levi la organizan kaj idean nivelon", "levi la prestiĝon" de Esperanto kaj "influi la internacian vivon". Germana Esperanto-Asocio (GEA) bonvenigas tiun kampanjon, vidante en ĝi multajn erojn kongruajn kun la propra kampanjo GEA 2000. En la lasta kunsido la estraro de GEA longe debatis pri la tiucelaj agadoj de GEA, kun gamo da rezultoj.

GEA 2000: Socia merkato

Rondciferaj jaroj radias ion magian, sed la vere gravaj jaroj estas aliaj. Por Germanio la plej grava lastatempe estis 1990, tiu de la unuiĝo. Por GEA, ĝi estis 1991, kiam unuiĝis la du germanaj landaj asocioj GDREA kaj GEA.

Sendube, la kunfandiĝon de la du asocioj karakterizis samrajteco kaj respekto. Tamen, kunvenis du tre diversaj asocioj, kaj necesis multe da interna laboro por kunvenigi la membrojn ne nur asocie, sed ankaŭ emocie kaj kulture.

Pro tio ne estis hazardo ke ĝuste en tiu jaro 1991 GEA startigis sian strategian kampanjon GEA 2000. La slogano de GEA 2000 estis kaj estas "ideo trovas merkaton".

Paroli pri merkato rilate al Esperanto ŝajnas preskaŭ ofenda al multaj esperantistoj. Ideo ne estas io por vendi, sed io heroa, preskaŭ sankta; ne miksu ĝin kun tiu fikapitalismo!

Ideo trovas



Sed ĝuste tie situas unu el la plej gravaj problemoj de nia movado. Estas fakto ke en la nuntempo centoj, ja, miloj da ideoj svarmas tra la mondo. Ĉiu serĉas siajn adeptojn: ĉu ekologiismo aŭ homaj rajtoj, ĉu plej profanaj ideoj kiel amuziĝo! Tiuj miloj da ideoj batalas inter si por loko en la kapoj de la homoj. Gajnas tiu kiu aplikas la plej adekvatajn kaj modernajn metodojn, malgajnas tiuj kiuj preferas resti sur sia idealisma nuboj, ŝvebantaj en la intelektula nirvano.

Landaj asocioj ekkampanjas

La landaj asocioj de UEA ricevis antaŭ kelka tempo la dokumenton "Sugestoj por laborplano de landa asocio lige kun Kampanjo 2000". Pluraj el ili jam pridiskutis kiel konkretigi la kampanjon en sia medio. Jen ne-elĉerpa raporto pri planoj kaj paŝoj de kelkaj respondintaj asocioj:

Bulgara Esperanto-Asocio subskribis kontrakton pri aĉeto de nova oficejo en la centro de la ĉefurbo Sofio. BEA atendas ĉiurilatan helpon de organizaĵoj kaj individuoj esperantistaj — ĉu financan ĉu laboran — por frue malfermi la novan BEA-ejon. (*Bulgara Esperantisto*)

Hispana Esperanto-Federacio celas: almenaŭ 10%-e pligrandigi sian membraron; aranĝi klerigajn renkontiĝojn en la jarkongresoj de HEF; reaktivigi la landajn sekciojn de TEJO kaj ILEI; uzi la novan hispanlingvan informlibreton *Pro Esperanto* kaj kreotan informilon triptik-forman por prezenti Esperanton (ekz. en la Madrida lingvofoiro Expolingua, verŝajne en 1999); disdoni almenaŭ 5000 informilojn ĉiujare. (A. Manero)

Itala Esperanto-

Federacio: pliigi, ĝis la jaro 2000, la nun ĉ. 1200-kapan anon al 1350; renovigi la inform-materialojn per produktado de afiŝoj kaj faldfolioj okulfrapaj, kaj de broŝuro pri la movado; plibonigi kaj ampleksigi la ĉeeston de IEF en TTT. (F. Amerio)

Japana Esperanto-Instituto:

Kvinmembra Komisiono por Kampanjo 2000 elektis en sia unua kunsido (9 nov.) sep kampanjajn temojn al kiuj Japanio povas konvene kontribui (ekz. "Amikoj de Esperanto" kaj dua Nitobe-Simpozio) kaj provizore decidis pri ties zorgantoj. (SYŌZI K.)

TTT-paĝo de Don Harlow kun informoj pri Kampanjo 2000:
<<http://www.best.com/~donh/Esperanto/Kampanjo2000>>.

s merkaton




Foto: Drago Smalc

En sia kampanjo "GEA 2000", Germana E-Asocio strebas levi la prestiĝon de Esperanto per pli profesiaj metodoj ol la surbilda: propagandi per plasta sako al vaksfiguro de gravulo.

La sukcesaj sociaj organizaĵoj, kiel ekzemple Greenpeace aŭ Amnestio Internacia, ĉiuj praktikas la metodojn de socia merkato. T.e. ili komprenas sian ideon kiel produkton, kiun oni devas ofense oferti al celgrupoj kaj vendi. Ideo ne venkos per si mem, kiam alvenis ĝia tempo. Ideo venkos, se oni vekas deziron pri ĝi kaj se oni faras ĝin alloga.

De akcepto al realigo

La membrokunveno de Germana Esperanto-Asocio akceptis tiun ĝeneralan aliron jam en 1991, kaj ekde tiam la strategia debato en GEA evoluis en tiu direkto. Intertempe ni transiris diversajn fazojn: ni formulis la gvidajn principojn de GEA, analizis niajn fortojn kaj malfortojn, ekzamenis la evoluon kaj ideajn bezonojn de nia socio, kaj fine eltrovis niajn merkatojn kaj celgrupojn. Temas pri procedo kiu daŭris pli ol kvin jarojn. Ĝi enhavis multe da sukcesaj debatoj, sed kompreneble ankaŭ da mispaŝoj. Ĉiukaze, la kampanjo sukcesis aktivigi multajn membrojn, kaj — kio estas plej grava — la principo de socia merkato rilate al Esperanto nuntempe en GEA trovas vastan subtenon.

Nun ni troviĝas en la fina fazo de realigo. Kaj ĝuste nun venas Kampanjo 2000 de UEA: pli trafan temon ni fakte ne povis antaŭvidi. Ni povas realigi la rezultojn de nia propra strategia debato enkadre de Kampanjo 2000 kaj konforme al ĝiaj celoj. Tiel ni vidos ĉu nia propra vojo estas ĝusta, kaj samtempe ni povas prezenti nian laboron al la tuta movado.

Strategiaj paŝoj en 1998

GEA deklaris la jaron 1998 la jaro de informlaboro. En 1998 GEA restrukturos sian tutan informlaboron. Parte ni jam faris tion dum la pasintaj jaroj, ekz. per evoluigo de plej diversaj informiloj kaj per la apartigo de nia gazeto *Esperanto aktuell* al du eldonoj germanlingva kaj Esperanta, laŭ la malsamaj celgrupoj.

En 1998 ni pli forte utiligos la germanajn numerojn por publika agado. Same, ni instalos rebatan servon, kiu organizos la skribadon de legant-leteroj post apero de Esperanto-koncernaj artikoloj en gazetoj; ni pliintensigos la informservon, kiu regule dissendas gazetarajn informojn; ni organizos "bazan servon", kiu analizos bazajn informojn pri Esperanto, ekz. en leksikonoj, cele al ilia objektivo. Fine, ni ankaŭ klerigos niajn membrojn rilate al tiu laborkampo, t.e. ni planas seminarion pri publika agado por la komenco de 1999 kaj instalon de konstanta komisiono pri publika agado.

Komence de 1999 ĉiuj ĉi agadoj estu tiom evoluintaj ke ili glate funkcii dum la Universala Kongreso en Berlino (julio 1999).

Tiuj paŝoj estas la plej gravaj, ĉar ili servos al la levado kaj de la prestiĝo de Esperanto kaj de la organiza nivelo. Per pli da (pozitiva) informlaboro kreskos nia prestiĝo, kiu sekve altiros novajn homfortojn.

Kunlaboro kun neesperantistoj

Sed samtempe ni iras ankaŭ aliajn vojojn. Celante pli da financaj rimedoj, ĉi-jare ni unuafoje sukcesis ricevi subvencion por Printempa Semajno Internacia (6-13 apr., Bonn). La t.n. Orient-Okcidenta Fondaĵo pagas al ni sufiĉe grandan sumon, ĉar ni metas la programon sub la temon "Familioj en oriento kaj okcidento". Krom la mono ni rikoltas plialtiĝon de nia prestiĝo ĉe tiu fondaĵo. Same ni faros ĉe tre granda kaj grava seminario en meza Germanio (Internacia Domo Sonnenberg). Tie ni ripetos seminarion pri internacia komunikado (oktobro de 1998), kiun ni jam okazigis tre sukcese en oktobro 1997.

Tio estis du ekzemploj de kunlaborado kun gravaj ekster-Esperantaj organizaĵoj. La vojo estas: elekti temojn kiuj estas najbaraj al Esperanto kaj samtempe eniras la sferon de aliaj organizaĵoj.

Same ni faris jam tre sukcese dum la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso (Stutgarto, 1997). Tie ni debatis kun politikistoj pri la pligrandigo de EU, tiel ke poste ni ricevis tre pozitivan eĥon al "la granda kompetenteco kiu regas inter la esperantistoj".

Kompetenteco

Jen alia grava strategia punkto: la kompetenteco. Bernard Golden iom malelegante skribis pri "propagandaj mispaŝoj" (jul.-aŭg. '97, p. 131). Per sia stilo li provokis multe da riproĉoj, kaj mi timas ke tiamaniere li atingis la malon de sia celo. Mi timas tion ĉar en la kerno li fakte pravas.


En Esperantujo regas stranga sinteno: plej gravas ke homo agu, sin oferu, propagandu — tute egale kiel. Almenaŭ li agu. Pro tio dum la Ago-Tago la sindediĉaj esperantistoj vestas sin per verdaj jupeoj kaj ĉapo, svingas verdan flagon kaj manifestacias dudekope, kantante la Himnon. La plej pozitiva reago de la "normala" popolo al tiaj karnavalaĵoj estas — ĉu mirinde? — ridado.

Esperanto aŭ IHL?

Reage je alvoko de la UEA-komisiito pri Kampanjo 2000, Renato Corsetti, al fakaj asocioj, Bernhard Westerhoff, sekretario de Bahaa Esperanto-Ligo, sugestas gravan modifon al unu el la kampanjaj celoj.

Rilate la celon “Influi la internacian vivon” de Kampanjo 2000, nia movado supozeble tre saĝe farus se ĝi klare distingus inter agado por Esperanto kaj agado por la adopto de internacia helpa lingvo (IHL), ĉar unuflanke multas la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed aliflanke probable vastan subtenon trovos la ideo enkonduki IHL (aŭ alivorte: duan komunan lingvon por ĉiuj).

Per kunlaboro kun la apogantoj de ajna propono por IHL aŭ por la ideo de komuna lingvo por ĉiuj, konsiderinde kreskus la ŝanco entute ion movi en la mondo. Se kunmetebus ĉiuj fortoj por premi la koncernajn instancojn kaj personojn, eble oni ja sukcesus ekirigi veran diskuton pri la nun netraktata, ignorata aŭ prisilentata lingva demando. Sed supozeble nur tiam nia movado povos gajni la apogon de amasoj kaj sukcese enigi la lingvan demandon en la tagordon de la gravaj instancoj, asembleoj, konferencoj, organizaĵoj ktp, se ĝi rezignos pri propagandado sole pri-Esperanta — almenaŭ enkadre de siaj eksteraj rilatoj — kaj ne tro ĝenos sin pri siaj aliancanoj. Probable nur tia sinteno ebligos al ni elniĉiĝi kaj ekrampi sub la spoton de la tutglobaj disvolviĝoj.



‘Abdu’l-Bahá: “internacia helpa lingvo [...] estos aŭ unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ nova lingvo...”

Foto: El Bahaa Esperanto

Klare, por la rolo de IHL povos teorie adoptiĝi kiu ajn el la amaso da lingvoj — ĉu ekzistanta, ĉu ankoraŭ inventenda, aŭ eĉ lingvo ekzistanta sed adoptota post reformo. Do, Esperanto reduktiĝas al unu kandidato meze de amaso. Je tiu imago ĉe kelkaj aktivuloj eble vringiĝas la animo. Sed tiuj vere konvinkitaj pri la kvalitoj de Esperanto ja neniel devas timi la kunlaboron kun eĉ siaj — kiel kelkaj eble sentos — “malamikoj”. Ĉar se vere leviĝos serioza diskutado pri la tutmonda lingva situacio kaj problemaro, aŭtomate kaj neeviteble surtabliĝos ankaŭ la solvopropono Esperanto. Kaj tiam senhezite eblos sterni ĉiujn argumentojn por-Esperantajn.

Aktuale la strategia celo por influi la internacian vivon estu vekti la konscion pri la bezono de IHL kiom eble vastaskale kaj samtempe je alta nivelo (intelektala kaj instanca). Nur duagrada estu la demando pri *kiu* lingvo temos. Konkreta celo povus esti la instalo de altranga komisiono ĉe UN aŭ EU por la zorga studado de la afero de IHL kaj por adopto de komuna skribo.

Kaj tiurilate ankoraŭ propono: La (Praga) “Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto” jam malfermas la pordon al pli vasta argumentado (demokratio, tutmonda konscio, lingvaj rajtoj, emancipiĝo). Ĝi tamen fokusigas je la lingvo Esperanto.

Tial estu ellaborata, ĉi-foje prefere kune kun aliaj internaciaj organizaĵoj, dua manifesto: “Manifesto de la movado (alianco? koalicio?) por la adopto de IHL”! Tiu povos preskaŭ egali la Pragan. Necesos nur anstataŭigi la punktojn konkrete rilatantajn al Esperanto per punktoj IHL-konformaj kaj iom pli emfazi la nunan mankon kaj la utilon de internacia helpa lingvo.

Bernhard Westerhoff (Germanio)

☞ Mi eble estas iom rigida. Plej ofte ja temas pri tre amindaj kaj bonkoraj homoj. Kaj mi volonte kunkantas la Himnon en internaj esperantistaj aranĝoj. Sed la problemoj estas ke multaj esperantistoj jam ne plu rimarkas kiel tia agado aperas al la publiko, al la cetera popolo. Ĉu vi iam vidis anon de Greenpeace kanti himnon kaj svingi flagon en la publiko? Memoru: unu malprofesia esperantista propagandisto forpelas dekoble pli da homoj ol li altiras!

Sekve GEA plu iras la vojon al serioza kaj kompetenta prezento de Esperanto. Ni faras tion unuflanke per klerigo de niaj membroj kaj duaflanke per elektitaj homoj kiuj gvidas la laboron en la diversaj kampoj kaj tenas la gravajn kontaktojn. Tre signifa paŝo tiurilate estis la instalo de pagata afergvidanto de GEA, kiu garantias la direktan kaj konstantan laboron kun la ekstero.

En la medio de lingvistoj ni jam havas bonan reputacion, grandparte pro la grava kontribuo de niaj amikoj el eksa

GDR. Ĉe la eŭropaj politikistoj ni estas sur bona vojo, samkiel en la ministerioj pri junularo. Ni volas pligrandigi tiujn cirklojn kaj tiel atingi pli kaj pli da gravaj celgrupoj.

Resume

Informado, kunlaboro kun aliaj organizaĵoj kaj montrado de nia kompetenteco kaj seriozeco — jen la temoj de nia agado en 1998. Multe da laboro staras antaŭ ni. Sed ni kunigas niajn fortojn cele al sukceso de GEA 2000, de Kampanjo 2000 kaj, ne laste, de la Universala Kongreso en Berlino. Por ĝi niaj klopodoj en 1998 estas jam tre bona ekzerco. Venu do en 1999 al Berlino kaj prijuĝu surloke ĉu ni sukcesis.

Frank Stocker

*Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio
Inheidenerstr. 39, DE-60385 Frankfurt, Germanio
☐FHSstocker@aol.com*

Montpeliero montras multajn facetojn

La suda parto de Francio estas riĉa je antikvaj memoraĵoj el la epoko de grekoj kaj romianoj. Kvankam Montpeliero naskiĝis multe pli malfrue, en la jaro 985, ne malpli abundas en ĝi vidindaĵoj. Per teksto kaj fotoj gvidas nin Jeannine Bony.

Se plaĉas al vi la mezepoka faceto de la urbo, promenu sur la bulvaroj: la “ŝildo” desegnata de ilia linio signas la iamajn remparojn. Postrestas kelkaj pordegoj aŭ turoj: jen turo de la Babote (foto 1), kies bazo datiĝas de la 13-a jarcento. Sine de la “ŝildo”, ĝuu la ombbron de la mallargaj stratetoj, laŭiru la deklivojn de la urbaj montetoj, levu la kapon por malkovri malnovajn nomojn de la stratoj, inkrustaĵojn de romanikaj aŭ gotikaj arkoj en domoj pli modernaj, statuetojn de sanktuloj en siaj niĉoj...

Ni haltu antaŭ la fasado de la Medicina Fakultato kaj gotika antaŭpordo de la Katedralo, restaŭritaj (foto 2).

Fotaj: Jeannine Bony




1. Turo de la Babote

La konstruaĵo datiĝas de la 14-a jarcento, sed la Medicina Fakultato famigis Montpelieron jam jarcenton pli frue. Por faciligi la laboron de ĝiaj studentoj, estis kreita la Botanika Ĝardeno en 1593, la plej malnova en Francio.

Post la mezepokaj plagoj de pesto kaj malsatego, post la dramo de la religiaj militoj, komenciĝis la elstara epoko de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. La reĝo Ludoviko la 14-a igis Montpelieron ĉefurbo de la regiono Langvedoko.

(daŭrigo sur p. 29)



2. Medicina Fakultato kaj antaŭpordo de la Katedralo

ŜLOSILO AL 75 LANDOJ

Probable la plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj **Pasporta Servo** aperadas ekde 1974. La freŝa, 164-paĝa kajero **Pasporta Servo 1998** enhavas 871 adresojn en 75 landoj.

Gastigantoj ricevas senpage la liston. Aliaj povas ĝin mendi je 24,00 gld. (kun triona rabato por minimume tri ekz.).

Derk Ederveen invitas ĉiun fariĝi gastiganto por 1999, ĉar tri libroĉekoj de po 100 gld. estos lotumataj inter la gastigantoj — almenaŭ se la listo en 1999 atingos “la magian nombron 1000”. Aliĝilo estas havebla de TEJO (adreso ĉe UEA, vd. la kolofonon), ĉe <http://home.wxs.nl/~lide/aligxilo.txt>, aŭ per mesaĝo al lide@wxs.nl, kun la temlinia teksto “pasporta servo aligxilo”.

La sekva aliĝa limdato estas la 1-a de nov. 1998. Jamaj gastigantoj ricevos memorigilon en aŭgusto. Por pliaj informoj vidu la hejmpaĝon <http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>.



KOTIZTABELO DE UEA POR 1998

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	8	21	52	31	20	104
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	28	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	260	650	410	250	1300
Belgio/franko	300	760	1900	1210	730	3800
Brazilo/guldeno	8	21	52	31	20	104
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Bulgario/guldeno	8	21	52	31	20	104
Ĉeĥio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Danio/krono	55	140	350	225	130	700
Finnlando/marko	45	110	275	175	105	550
Francio/franko	50	120	310	200	120	620
Germanio/marko	15	37	92	58	35	184
Greklando/drakmo	1500	3800	9600	6100	3700	19200
Hispanio/peseto	900	2300	5700	3600	2200	11400
Hungario/forinto	850	2200	5400	3200	1900	10800
Irlando/pundo	6	14	36	23	14	72
Islando/guldeno	16	41	103	62	37	206
Israelo/guldeno	13	34	84	50	30	168
Italio/liro	13000	34000	84000	53000	32000	168000
Japanio/eno	1100	2900	7200	4300	2600	14400
Kanado/dolaro	13	32	81	49	29	162
Korea Resp./guldeno	13	32	81	49	29	162
Nederlando/guldeno	16	41	103	66	39	206
Norvegio/krono	60	160	390	230	140	780
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	34	190
Pollando/guldeno	8	21	52	31	20	104
Portugalia/eskudo	1000	2600	6400	4000	2400	12800
Rusio/guldeno	8	21	52	31	20	104
Slovakio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Sud-Afriko/guldeno	15	37	92	55	33	184
Svedio/krono	70	160	400	250	150	800
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/guldeno	11	27	68	41	25	136
TARIFO B/guldeno	8	21	52	31	20	104

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Vivejo preskaŭ ideala

“Kiel mi sentas min kiel eksterlandano en suda Francio?”

Tion vi demandas. Nu, kelkaj sud-francoj eble protestos ke mi loĝas en Tuluzo, dum la kongreso okazos en Montpeliero — sed vidate de ekz. Japanio tiaj bagateloj bagatele bagatelas.

Unue mi devas averti la leganton ke mi estas “profesia” eksterlandano — mi loĝis en multaj landoj de pli ol tridek jaroj kaj kutimas adaptiĝi al diversaj kutimoj kaj vivostiloj kun relativa facileco. Sed persone mi trovas la sud-okcidenton de Francio preskaŭ ideala loĝloko. Mi povas demonstri tion laŭ tri punktoj:

☆ La vivostilo en suda Francio, kaj aparte en mia regiono, estas bona mezumo inter urbega nervozo kaj urbeto trankvilo. La kultura nivelo altas, kaj universitatoj abundas. Grava elemento estas kuirarto: en la sudo oni fritas per oleo anstataŭ butero — kaj la atendata vivdaŭro estas pli longa.

☆ La geografia situo estas tre agrabla. Montpeliero estas vere mediteranea, dum Tuluzo situas duonvoje inter maro kaj montaro, kun tre varia pejzaĝo, kun mezaj temperaturo kaj pluvemo.

☆ Grava elemento por mi estas la loka kulturo — la homoj sentas sin okcitanoj, eĉ se malmultaj vere parolas la okcitanan lingvon. Tute hazarde, la urbonomo Tuluzo skribiĝas *Tolosa* en la okcitana, sed prononciĝas ekzakte kiel en Esperanto.

Tamen, multaj loĝantoj en la sudo estas ĉu aliregionanoj, ĉu alilandanoj, laŭ ĉiuj gradoj de asimiliĝo, kio kreas riĉan kaj tolereman fandujon, en kiu mi sentas min tute ĉe mi.

Rikardo Cash
(Usono/Sud-okcidenta Francio)

Ĉu vi jam rekotizis por 1998?

Se ne, tiu ĉi estas la lasta numero de nia revuo kiun vi ankoraŭ ricevas!

La katarisma herezo

Tute nova mondkoncepto, kiun la Okcidento antaŭe ne konis, aperis en suda Francio (Okcitanio) en la 12-a jarcento. Ĝi rapide disvastiĝis kaj populariĝis, tiagrade ke ĝi endanĝerigis la Roman Eklezion.

Ĉi tiu devis dekreti sanktan militon (1208-29) kontraŭ la anoj de tiu mondkoncepto, kiujn oni nomis *kataroj* (de la greka *katharos*, “pura”).

La malbona mondo

La kataroj deiris de la ĉiutaga konstato ke malbono ekzistas en la mondo: doloro, malsano, morto, milito, maljusteco. Kiel akordigi la ekziston de iu kreinta dio nepre bona kun la ekzisto de kreaĵo nepre malbona? La kristana respondo estas ke Dio lasas la homon libera: tiu povas fari la bonon aŭ la malbonon, laŭ sia deziro. Bedaŭrinde, ĉi tiu sinteno ne klarigas la malsanon, la morton, la suferon de la bestoj, kiuj okazas ne kulpe de la homo.

La katara respondo estis alia: la kataroj opiniis ke la kreinto de la universo ne estas la bona kaj supera dio. Tiu kreinto estas iu alia dio malsupera, neperfekta, iu duondio, iu dia estaĵo okupanta la mezan lokon inter la homaro kaj la supera dio. Li estas Satano, la Demonio. Do la supera

3. Pordo de Montpeliera palaceto



Foto: Jeanine Bony

4. Palaca fasado

Dio tute ne respondecas pri la ekzisto de la malbono; li eble ne scias ke la malbono ekzistas.

La katara mondkoncepto estis do nete dualisma. Tio ne signifas ke la kataroj kredis al du dioj, sed al du principoj: Bono kontraŭ Malbono, Lumo kontraŭ Mallumo, Spirito kontraŭ Materio. Efektive, Bono kaj Malbono estas kontraŭaj ecoj: do ili estas kreitaj de du kontraŭaj principoj. La kataroj trovis fortan argumenton en la parolo de Jesuo, ke “ĉiu bona arbo donas bonajn fruktojn, sed putra arbo donas malbonajn fruktojn” (Mt. 7, 17). Sed la du principoj neniel estas egalaj: “Dio kreis nek la mallumon nek la malbonon”, diras la katara *Libro de la du Principoj*. Ekzistas du mondoj, la videbla kaj la nevidebla: ambaŭ havas sian dion. La nevidebla mondo estas la faro de la Bona Dio, kiu savas la animojn; la videbla mondo estas la faro de la Malbona Dio, kiu faras la portempajn aferojn.

La Dio de la Malnova Testamento, kiun la kataroj malagnoskis, estas ĝuste la malbona dio. Kaj ĉi tiu estas ankaŭ la dio de la Roma Eklezio, estigita de Satano por malaperigi la aman mesaĝon de Kristo. Laŭ la kataroj, la Roma Eklezio uzurpis la lokon de la vera eklezio, la papo estas nura trompisto, kaj la kruco estas nenio alia ol malrespektinda torturilo.

La eterneco apartenas nur al la bona principo. La infero disponas nur pri la tempo por enkarcerigi la animojn, kaj la tempo havos finon. Ĉe la fino de la tempo, ĉiuj animoj estos savitaj: la eterna infero ne ekzistas. La malbona principo, definitive venkita, enfermos sian senpovon en eternecon paralelan kaj vakuan.

(daŭrigo de p. 27)

Dio ne estas panpeceto


Koncerne la homon, ĉi tiu partoprenas, pro sia korpo, en la mondo malbona. Sed en tiu ĉi korpo troviĝas tamen ero de ĉiela lumo, kiu suferas. De tiu opinio venas la katara kredo al la metempsikozo, aŭ transmigrado de la animoj: post sia morto, bonulo reenkorpiĝos en korpon pli kapablan realigi la spiritan progreson. Male, malbonulo reenkorpiĝos en korpon malsuperan, eĉ en bestan korpon. Por la kataroj, ĉia mortigo, eĉ mortigo de besto, estas krimo. Efektive, mortiganto malhelpas ke unu animo havu la fortunon renaskiĝi en pli bonaj cirkonstancoj. Eĉ Jesuo ne povis havi ian rilaton kun la materio: lia enkarniĝo estas nura simbolo; la vero estas ke li rekte mal-supreniris de la ĉielo al la tero. Ankaŭ lia morto sur la kruco estis nur ŝajno. Same, Maria neniam ekzistis estiel materia virino: ŝi simbolas la Kataran Eklezion. Pro tiu sama kaŭzo, la kataroj ne kredis al la eŭkaristio, eĉ rigardis ĝin kiel hororaĵon: laŭ ili, oni pekas pro malrespekto al Dio, se oni akceptas ke Li povas alpreni la aspekton de panpeceto kaj de englutado da ruĝa vino.

Se la kreaĵo estas malbona, ankaŭ malbona estas la mult-obligo de la kreitoj. Do la kataroj kondamnis geedzecon kaj naskadon. La amorado estis do peko, ĉu dum edzeco, ĉu ekster edzeco, tute same. Tamen ili ne predikis la perfektan ĉastecon por ĉiuj; ili konsciis ke tio ĉi ne eblus. Do du vivmanieroj kunekzistis: la ĉasta por la "perfektuloj", la malĉasta por la simplaj kredantoj. Kaj, ĉar ĉio naskita per amorado estas malbona, la kataroj rajtis manĝi nek viandon, nek laktaĵojn, nek ovojn. Ili tamen manĝis fiŝaĵon, sed nur pro tio ke oni tiam kredis ke fiŝoj reproduktiĝas sen sekskuniĝo. La kataroj tute ne abomenis la ideon de

abortado, ĉar Dio kreis nur la animojn, ne la korpojn, kaj feti ankoraŭ ne havas animon.

La kataroj agnoskis neniun el la sakramentoj de la Roma Eklezio, eĉ ne la akvan bapton. La sola katara sakramento estis la "konsolamento", tiel nomata ĉar ĝi alportis la Sanktan Spiriton, t.e. la Parakleton, la Konsolanton. Sed doni ĝin al junaj infanoj, ankoraŭ senkonsciaj, estus abomenaĵo. Tute male de la romkatolikoj, la kataroj kredis ke sakramento neniel efikas, se la pastro donanta ĝin estas en peka stato.

5. Akvorezervujo kaj akvedukto



Ĉu la kataroj estis kristanoj?

Sen ia hezito, oni povas respondi: *ne*. Oni relegu ĉi-supre la liston de la nocioj al kiuj la kataroj kredis: neniun el ili estas trovebla en la romkatolika kredo. Oni listigu la nociojn al kiuj la romkatolikoj kredis: neniun troveblas en la katara kredo. Vere, sincere, ĉu oni rajtas nomi *kristanoj* homojn kiuj rifuzis la tuton de la kristana kredo?

Tamen de kelkaj jardekoj oni konstatas ke multaj historiistoj de katarismo elspezas multe da energio por identigi la kataran kredon kun iu simpla variaĵo de kristanismo: ili uzadas la esprimon *katara kristanismo*.

La kaŭzo de ĉi tiu alproprigemo estas klara. En la supozo ke la kataroj estis nekristanoj, ili havis nenian kaŭzon obeadi

al la ĉefo de la Roma Eklezio, kiu estis por ili eklezio tute fremda. Sekve, la persekutado al ili estas hontinda kaj maltolerema ago. Sed male, se supozu ke ili ja estis kristanoj, ili devus obeadi al la ĉefo de la kristana eklezio; ĉar ili efektive malobeadis al li en ĉiuj punktoj de la doktrino, ili estis malbonaj kristanoj. Sekve, oni persekutis kaj mortigis ilin tute prave. Tiu ĉi "alproprigo" celas do la senkulpigon de la Roma Eklezio je la krimo de amasa murdado.

La du solaj argumentoj de la "alproprigistoj" estas ke la kataroj nomis sin mem *kristanoj*, kaj ke ili bazis sian religion sur la Nova Testamento. Al la unua argumento estas facile respondi ke tiutempe la nomo *nekristano* signifis proksimume "pagano, malpiulo, nekredanto, sovaĝulo"; oni preskaŭ povus diri ke *kristano* signifis *homo sapiens*. Al la dua argumento oni respondu tute simple ke la ekzisto de nekristana kredo bazita sur la Nova Testamento montras ke ĉi tiu teksto entenas doktrinon tiel malprecizan ke per ĝi oni povas pruvi ĉion ajn... kaj ankaŭ la malon de ĉio ajn.

Ĉu la katarisma religio havis ian rilaton kun la aliaj dualismaj religioj: bogomilismo, maniĥeismo, mazdaismo? Tio estas tre verŝajna, ĉar tiuj ĉi religioj entenas mirindajn similaĵojn. Sed tio ĉi ne estas pruvebla, se oni konsideras nur la konatajn tekstojn.

André Cherpillod (Francio)

Transpontu la atendon

Jam temp' está
pensi
pri la UK...

MONTPELLIER
01 - 08
aŭgusto
1998

**83-a Universala Kongreso
de Esperanto**

... kaj glufirmi viajn kovertojn per la nova kongresa glumarko.
51x34mm. Blua-flava-verda. Folio kun 32 markoj: 7,50 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.

La okcitana lingvo

Okcitanujo — lando mondvaste konata pro sia bonega kuirarto, siaj fromaĝo kaj vino, siaj lumplenaj impresiismaj pentraĵoj.
Okcitanujo — lando tamen preskaŭ nekonata.

Ke Provenco (*Provença*) aŭ Langvedoko (*Lengadòc*) havas iel apartan lingvon, iuj ja malprecize konscias; la dua nomo, tiu de nia kongresa regiono, fakte egalas tiun de la lingvo (lingvo *d'òc*). Sed eĉ la lokanoj tute ne konscias pri la etendo de ties areo — kaj ofte eĉ ne pri ties lingveco.

Komence de la mezepoko la eklezio konstatis ke en multaj regionoj de la iama romia imperio la homoj ĝenerale ne plu kapablas kompreni la latinan, do la latinlingvaj liturgiaj tekstoj. Dum la 8-a jarcento ekestis la unuaj tekstoj en la okcitana, unu el la tiel nomataj malaltlatinaj formoj. En la 11-a jarcento tiu lingvo estis parolata en la suda duono de la hodiaŭa Francujo, la norda duono de la hodiaŭa kataluna landaro, la okcidenta duono de la nuna norda Italujo kaj, krom en ties nordo, ĉie en la niatepme francilingva parto de Svisujo. (Vd. la mapon dekstre.)

Poste, pro manko de centra ŝtato kaj de konscio pri la kuneco, la regiono disfalis en plurajn dialektujojn kaj tri lingvujojn. La nordo perdis sian okcitanecon, i.a. pro pesto en la regiono Puatuo (*Peiton*), post kiu envenis francilingvanoj en landon preskaŭ senpopoliĝintan. La oriento iom italiĝis, dum nur en la sudo okazis ekspansio pro katalunaj konkeroj.

Sed antaŭ tio, en la 12-a jarcento, la okcitana kulturo vivis ankoraŭ sian oran epokon trobadoran. La unua trobadoro estis Guilhem de Peitieu. Poeziis ankaŭ lia fama nepino Alienor d'Aquitania (1122-1204) kaj ties filo Rikardo la Leonkora (*Ricard Còr de Leon*, 1157-99), reĝo de Anglujo, same kiel ekzemple Marcabrun, Bernat de

Ventadorn aŭ Pèire Vidal. Inter la 11-a kaj la 13-a jarcentoj ili produktis poezion tute novstilan en Eŭropo — la kortegan amkanton. Tiun arton ili portis ĝis alta nivelo, tiel ke ĝi disradiis tra Eŭropo. Ilia literaturo estis multfaceta, kun diversaj poeziaj formoj, filozofio kaj pensado pri la lingvo mem.

Tiuj trobadoroj laboris por — aŭ parte mem estis — princoj. Rimarkinde, ilia arto preparis la terenon por

(daŭrigo sur p. 30)



La okcitana lingvujo en la 11-a jarcento

(daŭrigo de p. 25)

Montpeliero riĉiĝis kaj beliĝis. Jen, inter diversaj aliaj konstruaĵoj, privataj palacetoj de altranguloj, kies lignajn pordojn (foto 3, p. 27) vi devos puŝi por malkovri la kaŝitajn fasadojn (foto 4, p. 27).

Jen pli larĝaj spacoj:



6. Placo de la Komedio

- Promenejo Le Peyrou, sufiĉe alt-situa por ĝui belegan panoramon. Admiru ankaŭ tiun elegantan grekstilan konstruaĵon kiu kaŝas la akvorezervujon provizitan per akvedukto (foto 5, p. 28).
- Placo de la Komedio, kromnomita “ovo” (foto 6), kaj promenejo l' Esplanade.

Post la konstruaĵoj kiuj staras ĉe flanko de tiuj du lastaj promenejoj, ni forlasas la klasikan periodon de la 17-a kaj 18-a jarcentoj.

La tri Gracioj de la fontano sur la placo de la Komedio apudas Operejon de la 19-a jarcento (foto 6), simila al la Pariza operejo Garnier, servinta kiel ĝia modelo.

Tra la freŝdataj fontanoj de la Esplanado videblas nia kongresejo Le Corum (foto 7, p. 30), inaŭgurita en 1988.

Kun ĝi, aperas la lasta faceto de Montpeliero: ekster la “ŝildo” pli kaj pli disvolviĝas moderna urbo: la komerca Polygone, Antigone (vidu la kovrilon), kvartaloj konceptitaj de la kataluna arkitekto Ricardo Bofill, kaj baldaŭ la haveno Marianne, kiu kunligos la urbon kaj la maron.

Ĉiu el tiuj vizaĝoj de Montpeliero atendas vin.

Jeannine Bony (Francio)

(daŭrigo de p. 29)

la pacama katara religio (vd. p. 27 — Red.), kiun toleris aŭ eĉ partoprenis la princoj. Sed post kiam papo Inocento la 3-a ordonis al la franca reĝo ordigi la landon, jarcento da urbo-

Pireneoj oni primokis tion, plu skribante okcitane ĝis 1660 en Navaro (*Navarra*) kaj katalune eĉ ĝis 1738 en Rusiljono (*Russelló*). La blazono de la urbo Liono ankoraŭ nun havas okcitanlingvan devizon.

Foto: Joanne Bony



7. Le Corum, nia kongresejo

bruligado kaj inkvizicia amasmurdo igis la landon franca posedaĵo. Perdinte la subtenon de la princoj nun francdevenaj, la literaturo malpliĝis kaj en la 16-a jc. ĉesis. Post tio, mirinde, la homoj tute forgesis la trobadorojn, kaj kiam homoj kiel Loís Belau de la Belaudièra el Aikso (*Ais de Provença*) aŭ Pèire Godolin el Tuluzo (*Tolosa*) rekomencis skribi okcitane, ili uzis francecan literumon, tute malsimilan al tiu de la aliaj latinidaj lingvoj.

Oficiale la lingvo-neniĝa politiko komenciĝis en 1539 per la edikto de Vilèrs-Coterests (okcitana vilaĝo!), kiu postulis ke ĉiu skriba dokumento estu en la franca lingvo. (Ĝis tiam en la nordo oni ankoraŭ uzis la latinan.) Tamen en la malfacile alireblaj

Last-jarcente renaskiĝis la literaturo, interalie pro Frédéric Mistral (1830-1914), kiu kun aliaj aŭtoroj fondis en 1854 la tut-okcitanan movadon Félibrige, kiu ankoraŭ viglas. Li provis unuigi la lingvon per tutlanda vortarego, *Lou Tresor d'ou Félibrige*. En 1905 li ricevis Nobel-premion por sia poemo *Mirèio*. Samjare la "ruĝa" (maldekstrema) Langvedoko ekbolis kontraŭ la koloniismo pariza. La ĉefurbo mobilizis soldatojn kontraŭ la laboristoj kaj vinfaristoj, sed multaj rifuzis pafi. La lokanoj en tiu situacio forte eksentis sian alilingvan identecon. Sed jardekon poste, por paroli kun la kamaradoj en la tranĉejo de la unua mondmilito, la homoj unuafoje en sia vivo bezonis uzi la

kompare raŭkan nordan lingvon, kiun de kelkdekoj da jaroj oni devige enkapigis al ili lerneje. Tuj post la milito la langvedokanoj Perbòsc kaj Estieu renovigis la skriban lingvon, kaj Louis Alibèrt — al kiu oni ofte malpravete atribuas tiun sistemon nun 80-elcente uzatan — perfektigis ĝin en 1935. En la dummilita marionet-ŝtato de Vichy, kiu grandparte samis al Okcitanujo, la germanoj enkondukigis, kvankam ne je efika nivelo, la okcitanan kiel lernejan fakon. La motivo instigi diferencigon disde la franclingva nordo estis evidenta. En 1945 fondiĝis Instituto de Okcitanaj Studoj (IEO, *Institut d'Estudis Occitans*) en Tuluzo, kiel noviga kontraŭpoluso al la konservema Félibrige. Ĝi estas hodiaŭ reprezentata en ĉiu okcitana departemento, sed ankaŭ italflanke kaj en Parizo, kie loĝas multaj okcitanaj pro la malriĉeco de kelkaj regionoj. IEO vigle subtenas diversajn agadojn kaj eldonas multajn librojn. Tiuj tamen malfacile trovas publikon, ĉar multaj homoj supozas sin nekapablaj legi la lingvon kiun ili neniam rajtis studi lerneje. Certan plibonigon — kontraste al la pasintjarcenta alvoko al la instruistoj elradikigi ĉiun lingvon krom unu — oni ja konstatas. Sed ke entute nur 70 mil lernejanoj en 13-miliona popolo studas la lingvon estas apenaŭ sukceso, des malpli ke por multaj temas nur pri unu horo po semajno dum la lasta lernojar ekzamen-prepara. Pli feliĉaj estas tiuj 500 bazlernejanoj de la asocio Calandreta kiuj amuziĝas plene dulingve, tiel lernante senpeze. Baldaŭ sekvos eĉ mezlernejo — komence unu, poste pliaj.

La lingvon kiu estis ekskluzive uzata en la jarcent-komenco oni apenaŭ plu aŭdas hodiaŭ, kvankam duono de la loĝantaro komprenas ĝin kaj triono kapablas ĝin paroli. Ofte la okcitana lingvo estis jam false mort-deklarita, kaj la situacio plu malfaciliĝas. Nuntempe tamen, kiam ni spertas tutmondan vekigon pri tiaj problemoj, homoj ekkonscias pri sia riĉa heredaĵo. Ni esperu kaj helpu inversigi la tendencon!

Daniel Pfeiffer (Germanio/Okcitanio)

Red.: En ĉi tiu artikolo propraj nomoj kaj loknomoj aperas en formo Esperanta (se tia ekzistās) aŭ/kaj okcitana.

TEJO pri homaj rajtoj

Inter la 25-a de aprilo kaj la 2-a de majo TEJO seminarios en Vitoria/Gasteiz (Eŭskio, Hispanio) pri "Homaj rajtoj sub premo". Seminarianoj en la TEJO-aĝo (sub 30 jaroj) povos diskuti kaj spertiĝi, kun la helpo de fakuloj, pri la 50-jariĝanta Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, pri la praktika universaleco de homaj rajtoj, pri rajtoj de etnaj kaj alispecaj minoritatoj ktp. Pro la subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo de Konsilio de Eŭropo la partoprenkotizoj estas tre favoraj kaj oni ricevos 50% de la vojaĝkostoj.

Pliaj informoj kaj aliĝilo: Lariko Golden, Damjanich u. 1/c. I. 8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu.

Revenu al via vilaĝo!

Mem ĝuinte la 14-an Internacian Festivalon (27 dec.-3 jan., Treviro, Germanio), Renato Corsetti donas klarigon pri ĝia daŭra sukceso.

Dum jarmiloj la homoj vivis en homa dimensio: en sia grupo, en sia komunumo, en sia vilaĝo. Nun bedaŭrinde la progreso en malmultaj jardekoj forviŝis tiun esto-manieron. Oni naskiĝas en difinita loko, sed tre verŝajne ĉeestas lernejon en alia loko, universitaton en ankoraŭ alia urbo kaj laboras en granda urbo ĉirkaŭate de miliono da nekonatoj. Ĉu mirige ke oni strebas ree formi sian perditan vilaĝon?

jare la IF logis ĉ. 170 homojn al Treviro (Trier), i.a. kvardekon da infanoj.

Alia plaĉa aspekto de la Festivalo: preskaŭ ĉiuj konas ĉiujn kaj povas plezure konstati jaron post jaro kiel s-ro X. iĝas duonkalva, dum s-ino Y. konsiderinde dikiĝis post la tria infano ktp. Kaj se oni enuas interparoli kun X. (li ĉiam ripetis la samajn aferojn ekde la kongreso de Tireso), eblas partopreni la programon, taŭgan por doni la senton ke oni ja faras ion. Ĉi-jare estis tre seriozaj prelegoj pri natura medicino, NATO ktp.

Foto: Hans-Dieter Platz



Ulrich Brandenburg, direktoro ĉe NATO (maldekstre) bier-babilas kun Brian Moon, tradukisto ĉe Eŭropa Unio.

Tio, laŭ mi, klarigas la grandan sukceson de Internacia Festivalo. Temas pri renkontiĝo de mez-aĝuloj, kiuj kutimis renkontiĝi kiam ili estis gejunuloj. Al ili aldoniĝas ĉiam kreskanta kvanto da familioj kun infanoj plimalpli denaske parolantaj Esperanton.

La okazejo estas ĉiam Germanujo, lando relative centra en Eŭropo. Ĉi-

Kiel dirite, ĉiam pli abundas familioj kun etaj denaskuloj. Tamen, malsame ol en la Renkontiĝoj de Esperantlingvaj Familioj, ĉi tie plenkreskuloj staras iom pli centre de la programo. Infanoj estas akompanantoj.

Temas pri maniero plej plaĉa por pasigi la jarfinajn festojn. La slogano povus esti "Por la festoj revenu al via vilaĝo!" Jen psikologie tre refreŝiga sperto, ankaŭ por la urbestro de tiu vilaĝo, Hans-Dieter Platz, daŭre okupata sed daŭre kontenta renkonti homojn kiujn li vidis unuafoje kiam ili estis ardaĵ aktivuloj de Studenta E-Ligo (malfondita antaŭ ĉ. 30 jaroj).

Renato Corsetti (Italio)

(daŭrigo de p. 21)

Kanado: Malpli intime

Kvankam la klubo de Victoria (Brita Kolumbio) kutimas festi intime, ĉi-foje ĝi invitis ankaŭ interesitojn kaj kvakerojn, luinte bankedejon en kvakera domo. Venis dudeko da homoj: e-istoj malofte vidataj en kunvenoj kaj kelkaj ne-esperantistoj; unu el ĉi tiuj, pola ĵurnalistino, prelegis pri Zamenhof. (P. Hopkins, Interredaktore)

Kolombio: Babiltagmanĝo

En Bogoto 11 samtablanoj spektis post "babiltagmanĝo" la usonan televid-filmon *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* (okt., p. 171), pri kies hispanigo ili laboras. R. García disdonis sian artikolon pri amerikaj naciaj lingvoj, pralingvoj kaj E-o. (J. Gómez)

Kroatio: Saluton, Cezaro

Kroata E-Ligo organizis solenaĵon la 15-an de dec. en la domo de la juda komunumo Zagreba. La eldonejo Izvori, konata pro siaj E-lingvaj Asteriksoj, lanĉis reeldonon de la romano *Cezaro* de Mirko Jelušić, traduko de la stilmajstro Ivo Rotkvić aperinta en 1934 ĉe Literatura Mondo. (S. Štimec)

Pollando: Honoraj bjalistokanoj

Bjalistoka E-Asocio anoncis la 13-an de dec. la elektiĝon, el dek kandidatoj, de kvin "honoraj bjalistokanoj-esperantistoj", popularigintoj de E-o kaj Bjalistoko: Louis C. Zaleski-Zamenhof — subtenanto de la ideo rekonstrui la naskiĝdomon de lia avo; Stanisław Wakuliński, aŭtoro de Zamenhof-monumentoj kaj esperantaĵoj; Humphrey Tonkin, kunfondinto de Fondaĵo Zamenhof; Maria Maranda, iniciatinto de la unua E-filmo pri Bjalistoko; kaj Roman Malinowski, pola eksparlamentestro, iniciatinto de monda E-centro en Bjalistoko. (A. Zejdlar)

Usono: Atlanta proklamo

E-Societo de Atlanta konvinkis la urbestron Bill Campbell proklami Esperanto-tago la 15-an de dec., honore al la 110-jariĝo de la lingvo. (R. Dean)

En Novjorko, la 19-an de dec., 31 homoj ĝuis festivalan etoson, el kiuj 7 — el Rusio, Ukrainio kaj Meksiko — unuafoje vizitis la lokan klubon. Post Cécile Low, la klubon nun prezidas Nancee Medrano. (Novjorka Prismo)

...KAJ KIO PRI LA IS?

La 41-a Internacia Semajno de Germana Esperanto-Junularo finiĝis la 3-an de januaro en Trarbach. Dum la silvestra semajno la temo estis "Socio kaj komunikado". Venis al la IS ĉ. 290 homoj el 31 landoj.

Aparte multaj aŭskultis la prelegojn de Renato Corsetti, de la Kolonja historiisto Uwe Neddermeyer, de akademiano Jorge Camacho kaj de Raoul Hounnake el Togolando.

Ziko M. Sikosek, laŭ "Retventoj"

Pilgrimo ĉe jarmil-fino

“Ĉu estas vero ke Atilio troviĝis en kraŝinta kolombia aviadilo pasintan septembron?” — demandis iu en maltrankvila ret-mesaĝo la 14-an de januaro. La klaĉo estis dementita ankoraŭ en la sama tago de la sana kaj vigla Atilio Orellana Rojas, kiam ni intervjuis lin en Roterdamo.

Ĉu vi do troviĝis en tiu aviadilo?

En aviadilo, jes, sed ne en kolombia, kaj precipe ne en kraŝinta aviadilo. Mi ekveturis meze de novembro — ne de septembro — el San-Paŭlo al mia argentina hejmurbo Kordobo per plena flugmaŝino de la brazila kompanio VARIG. Tamen, ses aŭ sep minutojn post la starto la piloto malkovris misfunkciegon kaj devis tuj revenigi nin al la flughaveno. Feliĉe, li silentis pri la danĝero ĝis tuj antaŭ la alteriĝo, por eviti panikon. Kiam ni alteriĝis, jam la radoj kaj iuj eroj de la aviadilo estis forfalintaj, ekestis incendio. Ekvidinte la flamojn, la pasaĝeroj ekfuĝis en tumulto tra la mallarĝaj kriz-elirejoj. Iu puŝis min kontraŭ vandon, kio renovigis miajn spinajn dolorojn kaŭzitajn de aŭtobusa akcidento antaŭ kvar jaroj en Bolivio. Mirakle, ĉiuj saviĝis, kaj la aviadilo ne eksplodis. Fine mi veturis aŭtobuse al Kordobo, ripozis tie kelkajn semajnojn, kaj flugis al Nederlando pli malfrue ol planite. (Vi povas imagi mian aer-timon!)

Ĉu vi venis al Nederlando por gvidi unu el la Cseh-kursoj pro kiuj vi nun estas tutmonde fama?

Ne. Tamen tio kion mi faros nepre ligiĝas al la Cseh-kursoj: la 1-an de marto mi eklaboros ĉe Internacia E-Instituto en Hago, kie kreiĝos libera posteno de administranto post la retiriĝo de Mila van der Horst-Kolińska.

Konante vin, ni certas ke vi alprenos tiun taskon kun altaj ambicioj.


Nu, antaŭ miaj okuloj ŝvebas du celoj: transformi IEI en vere aktivan eduk-centron, kun kapablaj kursoj por rektametodaj instruantoj; kaj pli forte adapti la Cseh-metodon al la nuntempaj bezonoj. Instruado per rekta metodo ĉirkaŭ la jarmil-ŝanĝo ne

nuna homo pli atentis ankaŭ la aspekton. Necesas uzi pli da afiŝoj, fotoj, kartonaj ludiloj kaj — antaŭ ĉio — pli da aŭdvidaj helpiloj, kiuj ne ekzistis en la tempoj de Andreo Cseh. (La granda sukceso de la vidbendo *Mazi en Gondolando*, prizorgita de Mila van der Horst-Kolińska, pravas la ekziston de bezonego je tiaj lernorimedo.

Kiel vi mem instruas en viaj kursoj?

Fakte, kiam mi instruas en baza kurso, mia celo kompreneble ne estas ke la kursanoj tuj ellernu la lingvon,

Foto: Björn Thuy



Atilio Orellana Rojas kun siaj “tabelvortoj”.

povas okazi tute simile kiel en la floriĝo de Andreo Cseh, la jaroj 20-30-aj. La tiamaj materialoj estas parte eĉ hodiaŭ tute brilaj laŭ enhavo, sed

sed ke ili ekaprezu ĝian guston: sentante sin liberaj en la lernorondo, ili spertu etoson instigantan al plua studado memstara. La allogo de la lingvo en si mem ofte ne sufiĉas, se la kurso ne estas inspira. Mi mem, kiam mi

Libroj de kaj pri Andreo Cseh

Baza Cseh-kurso. Kompletu por komencanto. Hago: IEI, 1929. 15,00 gld.

Baza Cseh-kurso. Kun metodikaj konsiloj/gvidilo por instruantoj. Den Haag: IEI, 1992 (8-a eld.). 170p. 22cm. La originala teksto de 1929, ordigita laŭ la postaj modifoj de Cseh. 24,00 gld.

Baza Cseh-kurso: Kompletu por instruanto. Hago: IEI, 1987. 18,00 gld.

Daŭriga kurso post Cseh-kurso. Komp. Margarete Saxl. Eŭropa E-Eldonejo, 1983. 56p. 19cm. 12 lecionoj por studintoj de baza Cseh-kurso. 16,20 gld.

Faru la kontrolon! + Solvoj. Andreo Cseh. Den Haag: IEI/NGGE, 1993 (2-a eld.). 60+26p. 30cm. 20 tekstoj kun ekzercoj, ĉerpitaj el *La Praktiko* (1932-36). 45,00 gld.

Vortoj de Andreo Cseh. Komp. Ed. Borsboom. Saarbrücken/De Bilt: Artur E. Iltis/Societo Andreo Ĉe, 1984. 208p. 21cm. 66 diversaj, simplstilaj artikoloj de la fama pedagogo. 30,00 gld.

Andreo Cseh — la “gaja stelo” kiel “edzperanto”. Historio de romantika amo. Red. Ada Csiszár. Budapeŝto: la redaktinto, 1996. 56p. 21cm. Ilus. Kiel Cseh peradis inter estona “fraŭlino Esperanto” Veronika Eksta kaj hungara e-isto Paŭlo Tolnai. Korespondo inter Cseh kaj Tolnai el 1929-30. 7,50 gld.

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh. Red. Katalin Smidélusz. Sabatejo [Szombathely]: la redaktinto, 1995. 128p. 23cm. Fotoj. Dekoj da kontribuoj pri liaj vivo kaj metodo. Kun leteroj kaj aliaj vivdokumentoj de Cseh. 22,50 gld.

La domo en Hago

Internacia Esperanto-Instituto, ĉi tiel nomata de post 1939, estis fondita de ges-roj Isbrücker kaj Andreo Cseh kiel Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en 1930. Kultura fondaĵo, IEI celas eduki kaj trejni E-instruantojn pri Cseh-instruado kaj disponigi help-materialojn. Ĝi organizas Cseh-seminariojn kaj kursojn, eldonas librojn kaj aliajn helpilojn (plej notinde la Mazi-vidbendon). Ekde 1984 pli ol 30 personoj diplomigis ĉe IEI kiel Cseh-instruistoj. De 1991 IEI trejnas ankaŭ profesiajn lingvo-instruistojn al



IEI funkcias en Hago ekde 1933.

Foto: La Praktiko

gvidantoj de Cseh-seminarioj: trejniĝis en 1991 Gu Jian-hua (Ĉinio), en 1992 Atilio Orellana Rojas (Argentino) kaj en 1993 Katalin Smidélusz (Hungario).

La oficistaro konsistas el 5 personoj, kiuj laboras po 2-5 tagojn semajne. La financon de IEI stabiligas enspezoj el ludonso de unu el siaj du domoj, el kapitala rentumo, el donacoj kaj heredaĵoj, sed subteno al la UEA-konto "iein-q" estas bonvena kaj laŭcele uzata. Vizitantojn IEI atendas post telefona interkonsento ĉe: Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; ☎+31/70/355-66-77; ✉358-44-22.

eklernis Esperanton, tre suferis pro la ekstrema tedeco de tiu kurso: ne sentiĝis intereso ĉe la kursestro pri Esperanto nek pri la kursanoj.

Do, vi vekas intereson per mallonga kurso. Bone, sed kio poste? La ekinteresitoj ofte restas nevideblaj por la Esperanto-komunumo.

Tiun saman kritikon Cseh-instruistoj ĉiam devis alfronti, tiun demandon starigis en siaj verkoj ankaŭ la metodologoj Faulhaber kaj Rakuša. . . Vidu, mi bonŝance povis ripete reiri al pluraj landoj por re-instrui, kaj tie mi esploris ĉu mia antaŭa kurso havis sekvojn. Kion mi spertis? Nu, se en la baza kurso kreigis vere bona etoso, la kursanoj poste emis resti kune, kaj kelkaj faris mirinde rapidan progreson! Ekzemple en la norvegia urbo Tromsø, kie mi donis antaŭ du jaroj nur semajnfinan kurson, la ĉi-jaran instruadon organizis tiama lerninto mia, kiu nun bonege parolas!

Ĉu vi definitive stabiligos en Hago kaj ne daŭrigos vian mond-pilgriman instruadon? Estus des pli bedaŭrinde ĉar la vojaĝantajn Cseh-instruistojn hodiaŭ oni kalkulas per unu mano: krom vi, estas Katalin Smidélusz, Carla de Lorenzi, Ewa Bondar. . .

Mi ja devos plejparte resti ĉe IEI kiel administranto. Sed certe mi ne rezignos pluan instruadon, laŭeble en diversaj mondpartoj.

Ĉu viaj grandnombraj vojaĝoj de instruisto donis al vi inspiron verki?

Kiel vi divenis? Mi ĉiam, ĉie faris taglibrajn notojn, kaj surbaze de ili mi jam komencis verki libron. Ĝis nun pretas nur kvindek da paĝoj, sed mi povas promesi ke la libro estos finverkita ankoraŭ en ĉi tiu jarmilo! ★

DUOBLA KONFERENCO OMAGĖ AL WÜSTER

Okaze de la 100-jara jubileo de **Eugen Wüster** (1898-1977), fondinto de la terminologio-scienco kaj kunfondinto de la esperantologio, en Vieno okazos (24-26 aŭg. 1998) du konferencoj inter si ligitaj:

1. **SCIENCA KONFERENCO:** "Profesia komunikado, terminologio kaj planlingvoj";
2. **KVARA INFOTERM-SIMPOZIO:** "Terminologia laboro kaj scio-transigo".

Ambaŭ konferencojn kune organizas Internacia Instituto pri Terminologi-sciencia Esplorado (IITF), Internacia Informcentro pri Terminologio (Infoterm), Internacia Esperanto-Muzeo kaj la Unesko-komisiono de Aŭstrio. Al la oficialaj subtenantoj de la konferenco apartenas UEA kaj la germana Societo pri Interlingvistiko (GIL). La konferencingvoj estas la angla, Esperanto, la franca kaj la germana.

La du konferencojn malfermos komuna inaŭguro, kun prelegoj pri la vivo, verko kaj scienca signifo de Wüster, i.a. kun kontribuo de Detlev Blanke pri "Terminologio kaj planlingvoj". La unua konferenco krome havos sektion "Terminologio-scienco kaj planlingvoj" (gvidos Blanke).


Interlingvistoj kaj esperantologoj partoprenu la duoblan konferencon, aŭ almenaŭ la sektion pri planlingvo! Ĝi traktos la rilatojn de Wüster al planlingvoj, lian signifon de esperantologo en la pasinteco kaj nuntempo, la rilatojn inter planlingvoj kaj terminologio-scienco, terminologian agadon en Esperanto k.s. La prelegoj aperos en aparta volumo.

Pri organizaj demandoj direktu vin (en la germana aŭ angla) al: TermNet, Simmeringer Hauptstr. 24, AT-1110 Wien, Aŭstrio; ☎+43/1/74-04-02-80; ✉74-04-02-81; ✉termnet@termnet.at.

Pri prelegoj kaj rilataj temoj kontaktu Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio; ☎+49/30/541-26-33; ✉545-67-42.



Eugen Wüster



Kliŝdetruo trompe tradicia

Ekstremoj. Novelaro. Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek. Vieno: Internacia E-Muzeo, 1997. 207p. 23cm. 27,00 gld.

Literaturo estas pionira esplorado laŭ la landlimoj de la homa sperto; kaj samtempe ĝi estas *plilarĝigo* de tiuj limoj. Verkoj kiuj restas cis la rando de la abismo kaj ne kuraĝas transsalti kutimajn ideojn kaj moralajn antaŭjuĝojn, ne rajtas ambicii la titolon de literaturaj verkoj; eĉ kiam verkisto ŝajne partoprenas kun intima konvinkigo en la valor-sistemo de sia socio — kiel ekz. Stifter, aŭ ankaŭ Proust —, tamen ekzistas almenaŭ *unu* flanko de lia verko (ĉu la lingvaĵo, ĉu la psikologia introspekto) kiun oni povas difini ekstremisma. Literaturo oni legas por renversi sian mondkoncepton, ne por konfirmi ĝin; iamaniere, por eksperimenti ĉu ankoraŭ ekzistas en ni antaŭjuĝoj kiujn neniel pravigas la realo. Kiel dirus Kafka, libro devas esti “hakilo por la glacia maro en nia interno”.

Ĝuste tiuj ekstremoj fariĝas ĉef-temo en ĉi tiu proza verko de la “ibera skolo”, kiu jam produktis la poezian eventon de la lastaj jaroj, nome la kolektivan poemaron *Ibere libere*. En ĉi tiuj prozaĵoj, kiel en tiuj poemoj, la aŭtoroj instinkte manipulas kusan literaturo, kiu intence luktas *kontraŭ* la leganto kaj provas dementi liajn atendojn kaj senbazajn konvinkojn. La novela formo plej taŭgas por tiu kritike kliŝdetrua tasko, ĉar en trompe tradicia kadro kaj per fulmrapida fina renverso de la rakonto novelisto povas plej efike evidenti la iluzion stabilecon de nia plej baza pensrutino kaj ties kompletan mankon de realaj fundamentoj.

La aprioraĵoj kiujn la iberoj ekstremisme celis renversi, koncernas ĉefe la burĝan moralon. Kiel konate, burĝo postulas *nerekantan* rilaton al la vivo; ĉio kio tuŝas lin kiel simple naturan kaj ne kulturan estaĵon — do antaŭ ĉio sekso kaj morto — estas al li fremda

kaj malamika. Sekve, la temoj de ĉi tiu esence kontraŭburĝa novelaro rilatas ĝuste al sekso (malfidelo, unua amora sperto, seksa memkontentigo), al morto (sinmortigo, venĝo) aŭ al



La “ekstremistoj”. Horloĝ-direkte, de supre maldekstre: Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Miguel Fernández kaj Liven Dek.

ambaŭ (amo trans morto, aidoso); nur la temfadeno “toleremo” ŝajne rilatas al neniu el la du: temas ĉi-kaze pri ekstremismo pli vastasence politika.

Konkorde pri la komuna temaro, ĉiu kunlaboranto procedis laŭ sia individua stilo; tiu “diverseco en konkordo” estas maloftaĵo en la E-literaturo.

Fernández — kies lingva kaj poezia eminenco pruviĝis ankaŭ en lia poemaro *El miaj sonoraj soloj* — estas literaturo pli tradicia ol liaj kolegoj, sed tre avangarda el la lingva vidpunkto; ĉe li la protagonistista remaĉo de pasintaj spertoj stompiĝas en komparo kun la aktualaj emocioj. Ĝuste tiu intertuŝo de diversaj tempaj niveloj, kiel en “Londona uverturo”, povas deŝiri nin

de la rutino kaj puŝi nin al la rando de niaj spertoj; aŭ, per alia tekniko en “Kolonelo Sanz”, akra socia kritiko samlokas kun elegia defendo de kamaradeco kaj toleremo; aŭ, en “Alba”, kunfandiĝas rememoroj pri la plej altaj romantismaj tradicioj.


Camacho same ĵonglas per la lingvo, sed li ŝpinas siajn rakontojn certe malpli romantisme ol Fernández, kaj lia ekstremismo aperas kiel klerisma ciniko, kiu amuzite, kvankam inteligente kaj sentive, priskribas la kapriolojn de la novela intrigo. Akre cinikaj rimarkoj eĉ paradas unuavice, dum la rakonto disvolviĝas iel postkulise; laŭ vere profesia literatura tekniko, ĉe Camacho la intrigo nevideble kernas sub la plektaĵo de rememoroj, priskriboj, konsideroj. Kaj foje — en “Avataro”, ekzemple — tiuj lingvaj rumoroj, ŝajne tiom malproksimaj de “tradicia” rakonto, subite ekharmonias kaj soras al poeziaj akutoj.

Similan lertecon en la konstruado kun fina renverso — ekz. en “Litomiksa tombejo” — montras Gonçalo Neves, kies kontribuo (nur 16 paĝoj) tamen estas bedaŭrinde pli malvasta ol tiuj de la aliaj tri. Sed ĉefe en la noveloj de Liven Dek oni trovas eksterordinaran kapablon konstrui rakontajn mekanismojn kiujn oni ĝuas kun granda amuziĝo. Legu ekzemple “Rendevuo”, kaj nur ĉe la lasta frazo vi komprenos la komencan; similan atendon pri la disvolviĝo kreas la unua frazo de “Marta kaj Maria”, kvankam kun pli da patoso kaj homa komprenemo.

Fine: kvankam ĉi tiu novelaro estas verkita en altnivela literatura lingvo, ĝi neniel kontraŭas la fundamentan lingvouzon, neologismoj aŭ maloftaj vortoj ĉiam havas artan pravigon, kaj malfacilecon kompensas la seninterrompa artisma streĉo de la rakontado. La stilo do estas bela pruvo ke povas ekzisti esprimiva literatura Esperanto, kiu ja diferencas de la ĉiutaga lingvo kaj tamen estas daŭre pravigebla surbaze de sia arta kohero kaj senmakula fundamenteco. Multaj diletantoj, kiuj mistraktas Esperanton kiel ludilon por siaj neologismaj kaj eĉ nur lingve eraraj eksperimentoj, devus lerni el ĉi tiu volumo la strebon al inteligenta, ne amatora literaturo.

Mauro Nervi (Italio)

Laste aperis




Amparolo. Novelaro. István Nemere (1944). Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 80p. 21cm. Dek kvin noveloj pri dek kvin renkontoj. La deksesia Esperanta verko kaj tria novelaro en Esperanto de la aŭtoro. 12,60 gld.

Diccionario esencial Esperanto-català. Hèctor Alós i Font (1965) — Jordi Carbonell i Pinyol (1933). Sabadell: Kataluna E-Asocio, 1997. 165p. 21cm. Ringe bind. Dekmilo da kapvortoj kaj derivaĵoj. 18,60 gld.

ville/Moskvo: SAT-Broŝurservo, 1997. 96p. ISBN 5 7161 0032 5. 21cm. Analizoj de esencaj trajtoj de la Esperanta movado kaj komunumo. 10,50 gld.

Naturkuracado ekde antikveco ĝis nun. La popola medicino ekde antikveco ĝis nun kaj ĝia influo al nuntempa kuracado. Alicja U. Krejči-Lewanderska (1939). La aŭtoro, 1996. 92p. ISBN 83 906363 1 X. 21cm. Prilaboritaj notoj de kursoj dum AIS-studadsesioj (1994-96). 15,00 gld.



Tien aŭ ali-romanen? Ŝatantoj de du kontrastaj stiloj trovas frandaĵon ĉimonate. Ankaŭ Gates, Nemere kaj Szczurek proponas originalan prozon.

Ekumena diserva libro. Prov-eldono, 3-a kajero; Sanktaj Mesoj de la 50-a IKUE-kongreso. Villingen-Schwenningen: Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI, 1997. 83p. 21cm. 9,90 gld.

Ekumena preĝ- kaj kantaro. Prov-eldono; 1-a kajero; Kantoj el Taizé. Villingen-Schwenningen: Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI, 1996. 6+36+60 (nenumeraĵoj). 21cm. 9,90 gld.

Individuista manlibreto. Han Riner (ps. de Henri Ner, 1861-1938). El la franca trad. Valo. Beauville: Broŝurservo de SAT, 1997. 30p. 21cm. Demandoj kaj respondoj pri individuismo, fare de subtenanto de neperforta pacismo kaj amiko de Lanti. 2,40 gld.

Inter tero kaj ĉielo. Kvin gajaj memoroj. Benjamin Jacobsen. Adaptis kaj el la dana trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 38p. 21cm. Distraj rakontoj en facila lingvaĵo. 8,40 gld.

Malneŭtrale pri la neŭtrala. Esperantis-maj eseoj. Nikolao Gudskov (1953). Beau-



Ordeno de verkistoj. Romano (1985). Karolo Piĉ (1920-95). Saarbrücken: Edition Iltis, 1997. 382p. ISBN 3 932807 03 0. 21cm. Pri fikcia ordeno, "kies gemembroj tute nesanktule, malgraŭe tamen plene fakule okupiĝas pri la elkreado de la originala literaturo Esperanta" (la aŭtoro). Faksimilo de la origina tajpaĵo. 60,00 gld.

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 1998. Rotterdam: TEJO, 1998. 163p. ISBN 83 900118 3 2. 15cm. Mapoj. Kun 871 adresoj el 75 landoj. 24,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Rakontoj ĉe kandela flamo. Kazimierz Szczurek (1925). Beauville: Laŭte, 1997. 70p. 21cm. Intimaj rakontoj laŭ propraj kaj aliulaj vivospertoj. 8,40 gld.

Songonovelo (1925-26). Arthur Schnitzler (1862-1931). El la germana trad. Michel Duc Goninaz. Dobřichovice: Kava-Pech, 1997. 95p. ISBN 80 85853 34 5. 20cm. Novelo diverse komprenebla, aluda al la song-interpretado de Freŭdo. 17,40 gld.

Spite al ĉio Bosnio. Red. Senad Čolić. Sarajevo: ELBiH, 1997. 132p. 20cm. Elektio el artikoloj kaj informoj disaŭditaj en la radio-elsendo "Esperanto el Sarajevo", 1994-95. 22,50 gld.

Studoj pri Esperanto. Div. aŭtoroj. Du-lingva: ĉina-Esperanta. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1993. 225p. ISBN 7 5052 0078. 20cm. Tekstoj de Hujuc, Honfan, Piron, Auld k.a. pri ideoj kaj lingvaj aspektoj de Esperanto. 15,00 gld.

Tero kaj ĉielo kantu. Partoj I-III. Kompilis Adolf Burkhardt (1929). Villingen, 1995. 36 (nenum.) p. 21cm. 44 religiaj kantoj kun muziknotoj. 6,00 gld.

Tero kaj ĉielo kantu. Partoj IV-VII. Kompilis Adolf Burkhardt (1929). Villingen, 1996. 52 (nenum.) p. 21cm. 64 kantoj. 6,00 gld.

Tien. Romano. Johán Valano (ps. de Claude Piron, 1931). Vieno: IEM, 1997. 139p. ISBN 3 901752 12 9. 23cm. Pri mal-facile kredebla vojaĝo al paralela mondo: Ĉu vero aŭ halucino? 22,50 gld.

Traktatu d' un Linguaŭ universale. Abhandlung über eine allgemeine Sprache / Traktato pri ĝenerala lingvo. Rasmus Kristian Rask (1787-1832). El la dana trad. Ingeborg Zint en la germanan, Leif Kristensen en Esperanton. Eldonis kaj komentis Alicja Sakaguchi. Frankfurt: Peter Lang, 1996. 190p. ISBN 3 631 48803 3. 21cm. Projekto de aposteriora planlingvo fare de unu el la fondintoj de la historia lingvoscienco. 96,00 gld.

Vidvino kaj la profesoro, La. Romano. Ronald Cecil Gates (1923). Vieno: IEM, 1997. 132p. ISBN 3 901752 06 4. 23cm. Amromano aŭtobiografie inspirita. 22,50 gld.

Vojo de serpento sur roko, La (1983). Torgny Lindgren (1938). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 84p. 21cm. La plej konata romano de grava nuna verkisto, pri homa digno meze de la plej granda humiligilo. 12,60 gld.

Zamenhof et le judaïsme. André Cherpillod (1930). Francilingva. Courgenard: la aŭtoro, 1997. 67p. ISBN 2 906134 42 2. 21cm. Monografio pri ĉiuj aspektoj de la temo: cionismo kaj antijudismo, hebreaĵoj kaj jidaj influoj al Esperanto, hilelismo kaj homaranismo ktp. Aperis en Esperanto kiel *Zamenhof kaj judismo* (vd. dec. '97, p. 214). 18,00 gld.

DIVERSAĴO

Kompakta disko: Inter du amsezonoj. Nikolin'. LF-koop, 1993. Dudek du kantoj: plejparte tutmonde konataj melodioj kun Esperantaj tekstoj de Martinelli, Piron, Silber k.a. 42,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insigno k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Reagoj



Ne plezuriga *Heroldo*

S-ro Leen Deij malpravas asertante (dec., p. 209) ke la nova redakcio de *Heroldo* “inde daŭrigas la admirindan laboron de Ada Fighiera-Sikorska”. La trista vero estas ĝuste la malo, kaj tial mi de longe ĉesis kunlabori kun la novaj redaktoroj.

Malrespekto de la tradicio

En la protokolo, subskribita de Ada, de la asembleo de nia societo (la 17-an de julio 1996, kelkajn semajnojn antaŭ ŝia forpaso), oni povas legi sub punkto 3 ke *Heroldo* kaj ĝia milvoluma biblioteko estas transdonitaj al la nunaj eldonantoj “sen iu ajn financa kondiĉo”, nome senpage, kun la sola devigo pri “respekto de ĝiaj tradicio kaj principoj”. Tiu estis la nepra postulo pri kiu Ada insistis por donaci la gazeton.

Por ke ne estu duboj pri la tradicio kaj principoj de *Heroldo*, kiujn Ada evoluigis dum 36-jara laboro, mi transdonis al la novaj redaktoroj jarkolektojn de la gazeto kaj klarigis ĉiujn detalojn en dekoj da faksaĵoj kaj personaj konversacioj. En adiaŭa artikolo (16/1996) mi klare skribis: “La kondiĉoj de la transdono, akceptitaj de la novaj eldonantoj, estas garantii respekton de la ĝisnunaj sendependeco, akurateco kaj tradicio de la gazeto. (...) Ĉiuj legantoj tra la jaroj rimarkis tiujn principojn, nome: la gazeto gardas popularan kaj ĉefe informan karakteron; ĝi estas sendependa de esperantistaj organizoj, neŭtrala ne nur laŭ la spirito de la Deklaracio de 1905, sed ankaŭ rilate la movadajn pensofluojn kaj -konceptojn. Alivorte, *Heroldo* estas nek registara nek opozicia, nek raŭmisma nek malraŭmisma.” S-ro Silber, kiu mem proponis transpreni la gazeton kaj al kiu mi faksis la projekton de la artikolo, tuj telefonis al mi insistante ke mi forigu la suprajn frazojn, kion mi rifuzis.

Se la supre priskribita tradicio ne plaĉis al la novaj redaktoroj, ili estis liberaj rifuzi eldoni la gazeton. Tiu libereco validas ankoraŭ nun.

Negativa sinteno

Ekde la unuaj momentoj fariĝis klare ke la novaj redaktoroj havas multajn meritojn sur la kampo de la Esperanta kulturo, sed estas ekstremaj reprezentantoj de la t. n. “raŭmisma ideologio”, estas praktike izolitaj disde nia ĝenerala movado, kiun ili ideologie opozicias, ne legis pli frue *Heroldo* kaj ne konis ĝin. Eĉ pri niaj UK, kiujn ili ne vizitadas, ili ofte esprimis negativan opinion. Ili celis transformi *Heroldo* en organon de persona ambicio, en propagandilon de doktrino kiu splitas la esperantistojn, en armilon kontraŭ la t. n. “vertikala movado”.

Jam en la unua numero mi apenaŭ sukcesis eviti ke la novuloj ŝanĝu la kolofonon kaj la subtitolon de *Heroldo*. Pro tio, en n-ro 1/1997 mi skribis ke “ĉesas mia kunlaboro kun *Heroldo de Esperanto*, kies linion mi ne nepre aprobas”. La postaj numeroj komencis forigi eĉ rubrikojn fonditajn de Teo Jung kaj aperigis sub la nomoj de la du geredaktoroj aŭ sub iliaj pseŭdonimoj, ĉefloke kaj grandformate, ripetitajn pikojn, polemikojn, atakojn, pretekstajn intervjunojn kontraŭ nia monda organizo kaj ĝiaj principoj, kun samtempa elstarigo de la raŭmismaj principoj kaj malmodesta prezento de la redaktoroj. Kelkaj argumentoj, ekz. pri gejoj, estas ridindaj kaj malalt-nivelaj.

Ĉiuj miaj atentigoj restis senrezultaj: mian plendleteron oni cenzuris (same kiel faris UEA miarilate dum multaj jaroj). Mi pretas sendi kopion de ĉiuj dokumentoj indikitaj en la nuna letero al petantoj.

Konkludo

La nuna redaktado de *Heroldo* ne daŭrigas, sed malrespektas la laboron kaj la volon de Ada Fighiera-Sikorska, fuŝas la interkonsenton pri la transdono de la gazeto kaj tial senvalidigas la donacon. Kiel prezidanto de la ĝisnuna societo “*Heroldo de Esperanto*” kaj kiel kunlaboranto de mia edzino dum 36 jaroj,

mi bedaŭras ke la gazeto ne plu estas supertendenca kaj sendependa, sed praktike fariĝis organo de tendenca ideologia movado. Krème, kompare al la pasinteco ĝi draste malgrandigis sian informan karakteron favore al nesaĝaj komentoj de ĉiam la samaj personoj. Se mi komparas la nunan sintenon kun tiu de Teo Jung kaj Ada Fighiera, mi konvinkigas ke modesteco mortis.

Se tiu ĉi negativa tendenco plu daŭros, ni devos firme interveni. Ni ne bezonas stultajn batalojn de rezolucioj, nek disputojn pri tio ĉu ni estas movado aŭ komunumo (fakte, ĉiuj opinias ke ni estas ambaŭ), sed devas konkrete labori por la disvastigo kaj la utiligo de nia lingvo.

Gian Carlo Fighiera

Prezidanto de la leĝe registrita societo
sen profita celo “*Heroldo de Esperanto*”

Fakaj asocioj fruktodonaj

Esperanto povas allogi nur per utila aplikado por fakaj, profesiaj celoj. Se Esperanto devus resti nur klubaĵo, tiam ĝi jam de longe finvenkis! Pro tio mi preferas legi ne teoriumadon (ekz. “Moderno kaj postmoderno en nia kulturo” de Mark Fettes, nov. ’97, p. 182), sed raporton pri faka aplikado, kiel ekz. “Konciza historio pri fruktodona kunlaboro inter Triesto kaj Slovakio (sed ne nur) en mikologia kampo” en *La Eta Gazeto* (nov. ’97, p. 11).

La estonteco de Esperanto troviĝas ne en kluboj (kies tradicia, malmolderna agado povas eĉ forigi personojn kiuj vere interesiĝas pri Esperanto), sed en aktivaj fakaj asocioj, kiuj agadas profesie per Esperanto.

Germain Pirlot (Belgio)

Aludo misflanken

Kun surprizo mi legis la bildklarigon de foto pri iama aranĝo de Bahaa Esperanto-Ligo (dec. ’97, p. 208): “Esperantistaj bahaanoj en BELaj Tagoj (sep. 1991, Pisanica, Bulgario). Zamenhof rigardas flanken.”

Ĉu oni devus kompreni ke laŭ vi Zamenhof “malaprobis” aŭ “malestimis” la agadon de Bahaa Esperanto-Ligo? Kiel povus esti tiel, ĉar Zamenhof ja konis kaj estimis bahaĵismon, al kiu konvertiĝis lia filino Lidja?

Éric Coffinet (Francio)



• Arto: Kroata kostumkonkurso

Kroata Esperantista Unuiĝo (Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio) invitas gejunulojn inter 6 kaj 30 jaroj al konkurso pri "Popolkostumoj", ĝis la 1-a de aprilo. Kostumo aŭ parto de ĝi estu prezentita per ajna tekniko, en formato A4. Dorsflanke klare indiku viajn nomon, aĝon, adreson, kaj donu 2-3-frazan priskribon. La ricevitaĵoj verkoj estos prezentitaj en pluraj urboj de Kroatio. Ĉiu partoprenanto ricevos etan donacon, kaj la aŭtoroj de la plej belaj verkoj ankaŭ apartajn diplomojn. (M. Belošević)

• Filatelo: Stampo ĉiutage

La poŝto kaj Filatela Esperantista Klubo starigis la 8-an Tutlandan Junu-

laran Filatelan Ekspozicion en Goiânia (Brazilo) por festi la 110-jariĝon de Esperanto. De la 7-a ĝis la 16-a de novembro oni ĉiutage lanĉis novan memor-stampon. (R. Resende)



Ĉiutagaj
memor-
stampoj
el Brazilo.

• Interreto: Venas ciberuloj

Antaŭen – ¡Hacia adelante!, bulteno de Kordoba Esperanto-Asocio (Argentino), antaŭ nelonge salutis la unuan "ciber-esperantiston" de la urbo. Inĝeniero Andrés Ferreyra renkontis Esperanton dum navigado en Interreto, kaj lernis ĝin pere de la ret-kurso administrata de Marko Rauhamaa. Post bona ekrego de la lingvo, li jam aliĝis al KEA.

En *JennEspéranto*, bulteno de Junulara Esperantista Franca Organizo, ni legas la spertojn de per-reta lerninto pri sia unua malvirtuala E-renkontiĝo: la ĉeestantojn konsternis lia maniero skribi x-ojn anstataŭ ĉapeloj!

• Rotario: RADE turniĝas

La 65-membra Rotaria Asocio de Esperantistoj (RADE) havas novan prezidanton, la 65-jaran danan eksdiplomaton Eskil Svane (1 rue des Rouvières, FR-34230 Pouzols, Francio). Sekretario-kasisto kaj eldonanto de la asocia informilo restos Marc Levin, kiu jam dum multaj jaroj funkciigis RADE. (R.A.D.E-Informilo)

Red.: Eble malsprite, nia komento pri la situo de la Zamenhof-statuo rilate al la surbildaj bahaanoj celis aludi jenan artikolon: "la rilato inter la du movadoj estas foje ankaŭ problemdona... bahaanoj kaj esperantistoj emas reciproke sin konvinki kaj klopodas tiri la alian al sia flanko, ofte tamen sen preteco mem fari paŝon en ties direkto." Ni pardonpetas de ĉiuj kiujn la bildklariga frazo senintence ofendis.

Danke al regulemo

Dum hazarda relego mi trovis la formon *dank'* al (nov. '96, p. 182). La ellaso de la finaĵo -e estas lezo kontraŭ la baza 16-regula gramatiko de Esperanto. Ankaŭ ties foja misapliko fare de Zamenhofo mem ne praviĝas kadre de regulema lingvaĵo. Utiligu en la centra organo de la Esperantistoj unuecan lingvaĵon laŭ la baza kodo de d-ro Zamenhofo.

Franz-Georg Rössler (Germanio)

Meritoj emfazindaj

La nekrologo pri Rikardo Ŝulco (jan., p. 20) enhavas etan eraron: *Trigroša romano* de Bertolt Brecht, aperinta en 1977 ĉe la eldonejo Bleicher, estis tradukita ne de la forpasinta "poeto, tradukisto kaj gramatikisto", sed de la similnoma Karl Schulze. Tamen pli ĝenas min la fakto ke la nekrologo metas la emfazon sur la rolon de Ŝulco kiel iniciatinto de la Analiza Skolo. Miaopinie liaj ĉi-rilataj meritoj ne estas tre grandaj; ja eĉ estiĝis multe da malutilaj kvereloj.

Kontraste kun tio, vere enormaj, unikaj kaj admirindaj estas la sukcesoj kiujn Ŝulco atingis en la disvastigado de nia lingvo. Mi taksas ke ĉirkaŭ 20% de la nunaj membroj de Germana Esperanto-Asocio (inkluzive de ĝia prezidanto kaj de mi mem) fariĝis esperantistoj rekte aŭ nerekte danke al liaj germanlingvaj libroj, gazetaĵoj, eseoj, prelegoj ktp. Ankaŭ Universala Esperanto-Asocio devus pli forte agnoski la meritojn de Ŝulco en ĉi tiu kampo, ĉar sen lia agado UEA nombrus ĉirkaŭ 200 individuajn membrojn malpli.

Ulrich Matthias (Germanio)

Ŝulco nin adiaŭas

En 1990 Rikardo Ŝulco publikigis tradukon de la poemo "Sperto de la morto" de Rilke kaj dediĉis ĝin al la memoro de Brigitte Frank-Böhringer. Al ŝia vidvo li sendis kun letero (8 jul. 1990) "versaĵon, kiu ŝuldas sian estiĝon al nia leterŝanĝo pri la Rilke-versoj." Evidente li pensis pri ebla publikigo okaze de la propra morto. Jen tiu lia lasta publikaĵo. (Helmar Frank)

La poeto morta

*Li senkonscie kuŝas plenapace.
Malrevas li en ne spertita dormo.
Ankoraŭ vibras lia vivoformo
Laŭ la ĝis nun kutima normo
Inerte kaj malvigle, karapace.*

*Neniu scias, kiom li suferis
Pro manka amo kaj malamo snoba
Kun seka gusto el la guŝ' karoba,
Ĝojante jam pro vort' aproba
Kaj kiu harmonion dolĉan peris.*

*Li estis danko pro la ekzistado.
Sopiris humilege komprenemon
Kaj eĉ la lastan rekvieron,
Sursarkofagan krizantemon.
Li plene satis je la maskerado.*

Ŝulco Rikardo, 1990-07-01

Ankaŭ mi volas

aboni en 1998 al

EVENTOJ!

Baza kotizo: 74 NLG, aerpoŝte: 86 NLG

Per- sone



• Fjodorov: E-ista respublikestro

Rimarkinda rusia politikisto novgeneracia, la 39-jara prezidento de la Ĉuvaŝa Respubliko, Nikolaj Fjodorov, nomis sin esperantisto en konversacio kun la ambasadoro de Hungario, György Nanovszky, esperantisto, kiam tiu vizitis Ĉuvaŝion por gratuli lin nome de la diplomataro je lia duafoja prezidentigo. Fjodorov interŝanĝis kelkajn vortojn en Esperanto kun Nanovszky kaj diris ke li lernis la lingvon kiel studento sed poste deflanĝis. Pli frue Fjodorov estis justicministro de la Rusia Federacio, kaj ĝuste dum lia ministreco en 1993 Rusia Esperantista Unio oficiale registris sian statuton. (V. Aroloviĉ)



Ottó Haszpra

• Haszpra: Ĉu akademien?

Inter la sciencistoj lastatempe rekomendataj por membreco en la Hungara Akademio de Sciencoj estas prof. Ottó Haszpra, konata esperantisto. La akademia revuo *Magyar Tudomány* ("Scienco en Hungario") mencias inter liaj distingoj la diplomon Pro Esperanto de Hungaria E-Asocio. (B. Vaha)

• Ludovikito 80-jara

Ni gratulas la lanĉinton de la filologie plej ambicia kaj plej ampleksa eldonprojekto Esperanta, Itô Kanzi (Ludovikito), kiu fariĝis

80-jara la 15-an de januaro. "Iam kompletigota plena verkaro de Zamenhof" konsistas jam el pli ol 50 volumoj.

• Papo: Kvara E-Kristnasko

Kiel ĉiujare ekde 1994, en sia multlingva Kristnaska saluto papo Johano Paŭlo la 2-a denove deziris "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron" ankaŭ en Esperanto.

• Söderberg 95-jara

Unu el la tri plej aĝaj Honoraj Membroj de UEA, Karl Söderberg, iĝis 95-jara la 6-an de januaro. Lia Esperanta aktiveco komenciĝis antaŭ preskaŭ sep jardekoj: li i.a. instruis en radiokursoj, prezidis Svedan Esperanto-Instituton, estis UEA-komitatano kaj akademiano, kaj en Universalaj Kongresoj 16 fojojn li reprezentis la svedan registaron. La gazeto *Dagens Nyheter* amplekse artikolis pri la jubileulo.



Petăr Todorov

• Todorov: La kapo de BEA

La 56-jara inĝeniero Petăr Todorov, iama estrarano de UEA (1983-86), elektiĝis kiel prezidanto de nova, sepkapa estraro de Bulgara E-Asocio, en ties 48-a nacia kongreso (29-31 aŭg.).

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Germanio: Frank Nitzsche.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONO (minimуме \$100): Japanio: Nobuo Sakurai.

SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Brazilo: C. de Morães Lemos. Hispanio: Jesús Raposo Montero. Usono: Antonio Gomez.

AMIKOJ (minimуме \$10): Usono: Larry M. Gregg; Steven E. Sorenson.

PATRONOJ DE TEJO 1998

Aŭstralio: Idyss Einihovici. Belgio: Grégoire Maertens. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: Ian C. Jackson. Finnlando: Liisa Bergman; Tiina Oittinen. Francio: Alain Pialla; Bérengère Cheverry; Claude Longue-Épée; Gustave Blary; Henriette Cortes; Jean Dalet; Jacques Decobert; Maurice Feneyrol; Odile Masseron; Philippe Berizzi; Pierre Cheynet; Paulette Naulet; Roger Despiney; Frato René-Jean Marmou; Bert Huet-Schumann; Yvette Nicaise-Pierre. Germanio: Maria Vitalyos. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Japanio: Hidetada

Ito; Hirotugu Hukumoto; Zyun'iti Sibayama; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama; Iwao Katoo. Nederlando: Louise Adelaar; Marc van Oostendorp; Miny Massar-van Diepen. Pollando: Janina Bankowska. Usono: Jim Higgins.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Aŭstrio: Sieglinde Stamm. Belgio: Eliza Kehlet; Elfriede Ernst; Grégoire Maertens. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: Ian C. Jackson; Judith Jackson; Patrick E. Jackson; Robin Jackson; Adrian Vincent-Jones. Bulgario: Olga Gerasimova. Ĉinio: WANG Xue. Danio: Ejnar Hjorth. Francio: André Loisel; Claude Longue-Épée; Denise M.H. Loisel; Féodor Jelenc; André Gilles; Henriette Cortes; Hélène Gauduchau; Jeannine Croze; Jean-Paul Beau; Louise Marin; Maurice Feneyrol; Odette Bernet; Roger Despiney; Raymonde Perault. Germanio: Bruno Vogelmann; Heinz Schindler. Hispanio: Jesús Raposo Montero; Laurentina Parada De Palacios. Israelo: Josifa Rabino. Japanio: Kyotaro Deguti; Hirotugu Hukumoto; Kazuko

Kikusima; KUROYANAGI Yositaka; Kyôhei Nakazima; Nobuo Sakurai; SIMADA Sunao; Nobuyuki Syôzi; Yosikazu Takeuti. Luksemburgio: Brian R. Moon; Claude Nourmont. Nederlando: Danny ten Haaf; Huibert Oortwijn; Louise Adelaar; Marc van Oostendorp; Oene Hoekstra; Nell Overwater; Sija van Wijngaarden; Wiebren Akkerman; Miny Massar-van Diepen; Gerda H.M. Wulfers-Meddens; Yfke Weidema. Norvegio: Tamiko Kaŭakami-Nielsen. Slovakio: Helena Seres. Svislando: François Randin. Usono: David Wolff; Humphrey Tonkin; Jane Edwards; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; William R. Harmon.

DONACIOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de decembro 1997

(La tutjaraj sumoj indikas ne la staton de la koncernaj kontoj/fondaĵoj sed la sumon de la donacoj en 1997.)

Fondaĵo Afriko: Britio: A. Vincent-Jones 33,53. Nederlando: anonime 5000,00; anonime 2000,00; J. Bosse-Sibbel 27,00; T. Kanter

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.

Korespondi deziras: Fraŭlo 49-jara el Svedio, interesata pri vegetarismo, literaturo, bestoprotektado ktp, deziras rete korespondi tutmonde. aktiva.esperantoklubo@helsingborg.mail.telia.com.

Familia muzikgrupo Asorti serĉas eblon labori por Esperanto dum somero 1998. Asorti, Draugistēs 1-28, LT-4761 Visaginas, Litovio; ☎+370/66/31-286.

43-jara polino, oficisto, edzino kun tri infanoj, deziras korespondi kun homoj el diversaj landoj. Ŝatas turismon

Cláudia Cristina Grecco Bandeira,

16-jara, deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo. Preferataj temoj: pop-muziko, arto, anĝeloj, ekologio, kino, turismo. Rua 5 Numero 15, Sala 3, Centro, BR-74020-030 Goiânia GO, Brazilo.



kaj dancadon. Grażyna Byczkowska, ul. Podjazdowa 6, PL-60-480 Poznań, Pollando.

Du bulgarinoj deziras korespondi kun gejunuloj: Desislava Haĝijska (21-jara), akuŝistino, pri medicino, ginekologio, historio, belarto, muziko (str. Svoboda 12, BG-4640 Rakitovo, Bulgario) kaj Petja Garalova (17-jara) pri literaturo, belarto, filmoj (str. Ĥristo Smirnenki 11, BG-4640 Rakitovo, Bulgario).

Komencanto — utila kaj agrabla gazeto por komencantaj esperantistoj, komencantaj aŭtoroj kaj kursgvidantoj el la tuta mondo. 20 korespondadresoj ĉiunumero. RU-620041, Jekaterinburg-41, poŝtkesto 132, Ruslando.

Por disvolvi en nia regiono Esperanton, ni tutmonde serĉas amikecon kaj kunlaboron. Ni bezonas materialojn: revuojn, librojn kaj aliajn aferojn. Granma Esperanto-Filio — P.K. 48 Bájamo 1, CU-85100 Granma, Kubo.

OFICIALA INFORMILO

87,62; F.H. Kat 50,00. Sumo jarfina 22 792,26.

Fondaĵo Ameriko: Kanado: partoprenintoj de NOREK 131,60. Usono: E. Ellemberg 75,85; W. Maxey 100,00; J. Saunders 75,85. Sumo jarfina 3080,56.

Fondaĵo Azio: Hispanio: Esp-Biblioteko en Katalunio 29,79. Japanio: H. Hukumoto 62,26; M. Itabasi 31,13; K. Kakehi 155,85; H. Kumaki 31,17; H. Miedema 76,37; Y. Miwa 1556,50; S. Miyamoto 31,13; M. Niwa 76,38; T. Saitou 155,65; T. Tadaisi 77,82; T. Unoki 37,36. Sumo jarfina 8367,92.

Fondaĵo Belartaj Konkursoj: Sumo jarfina 8,00.

Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: O. Hoekstra 250,00; N. Moerbeek-Bartels 50,00. Sumo jarfina 525,00.

Fondaĵo Canuto: Brazilo: G.R. Ledon 28,50. Britio: E.W. McCanlis 10,00. Francio: S. Ardouin 33,65; J.J. Aumeunier 67,30; G. Boissière 33,65; R. Lebrun 33,65; C. Longue-Epée 168,25; L. Marin 100,95; M. Massemin 43,75; O. Masseron 201,90; T. Nowak 87,49; B. Robineau 249,01; A. Salamito 23,56; A.

Tailpied 33,65; J.-C. Trébouet 50,47. Hispanio: J. Raposo Montero 50,00. Israelo: J. Giladi 25,00. Luksemburgio: B. Moon 100,00. Nederlando: Fam. Duivenvoorden 200,00; O. Hoekstra 250,00; F.H. Kat 50,00; A.J. Middelkoop 500,00; R. Moerbeek 100,00; fam. Slot 500,00. Svedio: R. Moln 25,00. Usono: L. Buell 19,02. Div. malgrandaj 1,00. Sumo jarfina 9545,61.

Ĝenerala Kaso: Britio: A. Prent 53,44. Nederlando: W. Akkerman 136,00; M.I. v.d.Horst 3,00; A.J. Korfage-de Jong 24,00; J. Koopmans-Schotanus 100,00; Roter dama E-Societo "Merkurio" 500,00; J.M. Niemans-v.Beek 22,00. Nov-Zelando: T. Jansen 5,85. Usono: A. Gomez 99,90. Sumo jarfina 10 795,44.

Kampanjo 2000: Britio: W.H. Simcock 16,55. Sumo jarfina 31 733,46.

Konto Espero: Britio: A. Vincent-Jones 33,53. Nederlando: C. Bossong-Singer 26,75. Sumo jarfina 3501,04.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: O. Hoekstra 250,00; S. Rašić 50,00. Sumo jarfina 489,00.

Junulara Fondaĵo: Francio: G. Lascours 33,60. Sumo jarfina 3908,88.

Propaganda Konto: Sumo jarfina 9,06.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstrio: S. Stamm 35,00. Brazilo: S. Schenk Ledon 109,25. Britio: E.W. McCanlis 10,00; D.B. Kershaw 25,00; E.R. Waterworth 189,00. Luksemburgio: B. Moon 100,00. Nederlando: J. Bosse-Sibbel 25,00; Y. Weidema 100,00. Usono: L. Buell 19,02. Div. malgrandaj: 2,00. Sumo jarfina 2093,25.

Volontula Fondaĵo: Aŭstrio: S. Stamm 35,00. Belgio: G. Mallet 28,00. Brazilo: R.M. Marques Lemos 35,00. Britio: E.W. McCanlis 10,00. Francio: R. Hardy 20,19; L. Marin 100,95; J.-C. Trébouet 26,92. Israelo: J. Giladi 25,00. Japanio: G.L. Pompilio 23,78. Nederlando: J. Braamkolk-May 77,00; O. Hoekstra 250,00; R. Moerbeek 200,00; N. Moerbeek-Bartels 50,00; Y. Weidema 61,00. Div. malgrandaj: 3,00. Sumo jarfina 4215,84.

Al ĉiuj tre koran dankon!

NEA



• Ĉeĥio: Komenio en la kastelo

Origine lanĉita pasintan aprilon en la Ĉeĥa Kultura Centro de Varsovio, la ekspozicio "De Komenio ĝis Zamenhof" estis vizitebla de 19 nov. ĝis januaro en la kastelo de Prago. Inaŭguris ĝin prof. Vlastimil Novobilský, kiu en sia parolado emfazis ke, kvankam multaj el la ideoj de Komenio jam realiĝis, tiu pri lingvo universala ("Panglottia" ĉe Komenio) ankoraŭ atendas plenan plenumiĝon. (Starto)



• Norvegio: Turneo en Nordegio

La norvega esperantistino Kjellaug Råd Johnsen el Tromsø invitis aktivulon August Kilk el Võsu (Estonio) por kune viziti lernejojn en tri landoj, en la limregiono (nomata Barencio) de Norvegio, Finnlando kaj Ruslando, informante kaj instruante pri Esperanto. Ili planas novan turneon en marto. (Norvega Esperantisto)

• Usono: Kante planti napojn

Grupo de pli ol 70 homoj el 5 landoj ariĝis por la 4-a Aŭtuna Renkontiĝo E-ista (11-13 okt., Ludlow, Vermonto), aranĝo el kiu kreskis unu el la plej grandaj kaj sukcesaj kongresetoj de Norda Ameriko. En riĉa kultura vespero surprogramis i.a. omaĝo al Edmond Privat (kiu vizitis Usonon kaj eĉ ties prezidenton Theodore Roosevelt en 1907), originala teatraĵo prezentita de Novjorka kvaropo, kaj tutgrupa kant-plantado de napoj. Gitare akompanis Claude Piron, kiu ankaŭ ĉefprelegis, pri "Esperanto: kiaj perspektivoj?" (B. Maxey)

Neli ABAĜIEVA (1922-1997), bulgara aktivulino, iama delegito pri flegado, forpasis la 9-an de junio en Sofio.

Rita BEUG (1916-1997), dumviva membro, animo de la E-grupo en Würzburg (Germanio), iama vic- kaj turisma fakdelegito, mortis fine de aŭtuno.

Hans BIPP (1913-1997), esperantisto ekde 1929, aktivulo de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, ties prezidinto (1952-56), forpasis la 4-an de novembro en Birsfelden.

Maŭrico DE SASSI (1909-1997), dumviva membro, iama delegito pri socia literaturo, mortis la 11-an de januaro 1997 en Zuriko. Li aktivis ankaŭ en la komunista kaj naturamika movadoj, kaj prezidis la komisionon Esperanto Lernejen.

Jacques-Franky FARJON DE LAGATINERIE (1920-1996), iama estrarano de Germana Esperanto-Asocio pri kulturo (1987-89), mortis en 1996. En 1990 aperis en nia revuo lia diskutveka recenzo pri *La bona lingvo* de Claude Piron.

Milica HRNČIĆ (1924-1997) forpasis la 21-an de julio en Beogrado. Ŝi estis la unua prezidanto de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistaj, fondita en 1955.

Lev KOPELEV (1912-1997), rusa germanisto kaj verkisto, unu el la plej konataj disidentoj de Sovetio, mortis la 19-an de junio 1997 en Kolonjo. Li lernis Esperanton en 1926/27 en Ĥarkovo. En sia aŭtobiografio li emocie rememoris pri sia korespondado kun alilandanoj kaj pri la kontraŭnaciisma agado de SAT. Li skribis ke, kvankam poste li ne plu okupiĝis pri Esperanto, verŝajne ĝi gardis lin kontraŭ ksenofobio kaj grandpotenca ŝovinismo.

Zurab MAKASVILI, kiu tradukis *Aforismoj* (1983) kaj la epopeon *Kavaliro en tigra felo* (1989) — verkojn de Rustaveli —, forpasis antaŭ nelonge en Tbiliso (Kartvelio).

Rafael MÁRQUEZ PORRES (1917-1997), tri jardekojn delegito pri mondfederismo en Palma de Mallorca (Hispanio), mortis la 20-an de novembro.

Roger MOTTO (1911-1997), iama delegito pri fervojoj, forpasis la 7-an de novembro en Bessancourt. Aktivulo

de Franca Fervojista E-Asocio, li redaktis ties revuon *Esperanto Fervojisto* kaj gvidis kursojn.

Manoel NERY (1913-1997), dank' al kies kursoj centoj da homoj eklernis Esperanton en João Pessoa (Brazilo), forpasis la 1-an de septembro.

Helena RIIKONEN (1905-1997), klub-estrarano kaj iama delegitino en Turku (Finnlando), multe instruinta E-on, mortis la 20-an de novembro.

Aleksi ROMONEN (1915-1997), vicdelegito iama en Kuopio (Finnlando), membro de Societo Zamenhof, forpasis antaŭ nelonge.

Malte SMITH (1908-1997), dumviva membro, regula ano de Societo Zamenhof, mortis lastatempe en Kävlinge (Svedio).

Mario SOLA (1933-1998) forpasis abrupte la 1-an de januaro en Vercelli (Italio). Fondinto de la loka Esperanto-grupo, delegito pri juro, ofta



Mario Sola

gvidinto de kursoj, recenzinto de poeziaj verkoj Esperantaj, li estis de longa, tre aktiva esperantisto, kiu eĉ sian edzinon ekkonis dank' al Esperanto. Sola prezidis la italan sektion de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj redaktis la sekcian revuon *Katolika Sento*. Antaŭ kelkaj monatoj lian senlakan agadon kronis la 50-a IKUE-Kongreso (nov. '97, p. 187). Profesoro Sola instruis juron en superaj lernejoj, aktivis en katolika partio kaj en pluraj sociaj movadoj, kaj estis elektita kiel skabeno en sia urbo. La dulingva funebra ceremonio, kuncelebrita de 14 pastroj, okazis en la plenplena katedralo de Vercelli, en ĉesto de la urbaj aŭtoritatoj. La itala prezidento, Oscar Luigi Scalfaro, persona amiko de Sola, sendis grandan florkronon.

Josef VANĚČEK (1923-1998), fondinto kaj honora prezidanto de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, kursgvidinto, mortis la 8-an de januaro en Pardubice (Ĉeĥio).



En 1997 241 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – FR-49150 BAUGÉ
telefono : 02 41 89 10 34

Somera Programo 1998

- 19/06 – 03/07 Internacia Amika Renkonto
Nedevisa programo: kursoj por praktikantoj kaj lertuloj, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, distraj vesperoj
- 03/07 – 10/07 Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj
- 10/07 – 17/07 Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj
- 17/07 – 24/07 Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj
- 20/07 – 31/07 Internacia Metodika Semajno de ILEI por E-instruantoj (du apartajn semajnojn gvidos Duncan Charters kaj Katalin Smidélusz)
- 24/07 – 31/07 Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj
- 31/07 – 07/08 Kursoj por komencantoj (unua parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 07/08 – 14/08 Kursoj por komencantoj (dua parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 14/08 – 21/08 Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj
Diverstemaj prelegoj kaj aktivaĵoj okazos dum julio kaj aŭgusto. Je ankoraŭ ne precizaj datoj, gvidos kursojn: Ewa Bondar, André Cherpillod, Przemek Grzębowski, Nina Korjenevskaja, Juanita Turbillon, Jeannine Vincent.
Pliaj detaloj estas haveblaj kontraŭ respondkuponon aŭ afrankita koverto sendota al: Esperanto – P. Babin, 17 rue Romain Rolland, FR-85180 Le Château d'Olonne, Francio.

E. A. EKKER / D. EISENBURGER:

Franz Schubert Muzika albumo

Bela, bindita, plenkolora ilustrita 28-paĝa libro, plus 60-minuta kompaktdisko.

Eldonejo KLEKS, 1997. Prezo: 54,00 gld. Nur libro (sen disko): 30,00 gld. Triona rabato ĉe UEA ekde 3 ekz.



Internaciisto



Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK): Vincent Charlot (sekr.), 10, Square Savorgnan de Brazza, FR-94310 Orly; ☎+33/(0)1/48-92-63-79; ☎40-34-16-33; ✉esperant@worldnet.fr>. Revuo: Internaciisto (6 n-roj): p/a Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell, Hispanio; ☎+34/(9)3/ 727-50-21; ☎783-65-11; ✉jserrano@doc6.es.

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado



Rotterdam: UEA, 1995. Serio Konsilaroj por Aktivuloj n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Andrew O. Urevbu

Kulturo kaj teknologio



UEA

INTERESKAPTA LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Studo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologian evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologian ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.



Luiĝo kun la saŭco,
nia spiono 005 kun
paraŝuto, jen du el
la multaj roluloj
kiuj distros kaj
instruos vin en la
reviziita dua eldono



de la komunik-stila lernolibra serio *Tendaraj tagoj*.

Tendaraj tagoj, kajero 2, Stefan MacGill,
ILEI/UEA/HJEA, Budapest, 1997. 72p. Ilus. de Pavel Rak.
Mendu ĉe UEA: 15 NLG, triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membrigi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

Cent jaroj (1896-1996) da
stratoj, placoj, monumentoj,
bustoj, kulturcentroj,
tabuloj, parkoj, pontoj,
asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam:
UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabe-
loj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo:
18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Blonda leporo kaj Urso brunulo

Jen bela novaĵo en la magra
branĉo de nia poezio por infanoj.
Kolekto de 57 poemoj de 22 poetoj,
ĉio en flua kaj ofte surprize bela
traduko.

Al la mondo donace

Antologio de la serba porinfana poezio

INFANLIBRO DE LA JARO 1997

Elektis kaj el la serbokroata tradukis
Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia,
1996. 80+80p. 20cm. Dulingva. Kun
notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 24,00 gld.

Triona rabato ĉe samtempa mendo de
minimume 3 ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

Semajno de Internacia Amikeco



Amikeco trans limoj

okazos en la lasta plena semajno
de februaro, de la 22-a ĝis la 28-a.

Spertu kaj spertigu la plezuron
de amikeco per Esperanto trans
naciaj limoj. Legu la artikolon de
Edvige Tantin Ackerman pri SIA
en *Esperanto* (dec. '97, p. 207).



Por esti ĝisdata pri la
evoluo kaj faka literaturo
de interlingvistiko kaj
esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

RIKOLTO DE 50 JAROJ

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

*"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en
Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindeko de
miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia
biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe
pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. —
Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne
havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto.
Ekzemple, dum mia vivo mi verkis versajne centojn da
librorecenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al
tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la
rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora
laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)*

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj,
Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!



ALIĜILO

MONTPELIERO

Konstanta adreso: 83-a UK de Esperanto

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Aliĝadreso por francoj: Unuiĝo Franca por Esperanto

4bis, rue de la Cerisaie

75004 Paris, Francio



Kongresa numero:

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO

(por alfabeto ordigo)

VIRO/VIRINO

(forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J)

UEA-KODO

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO

TEL. N-RO (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO

NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;

☐ mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu.

☐ mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:

☐ al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 15 gld.).

☐ al ĝiro-konto n-ro 627337 Den Haag (aldonante 15 gld.; por nederlandanoj sen kostoj).

☐ per eŭroĉeko/poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.

☐ per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 21 gld.).

☐ per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis

☐ al la poŝtĉekkonto de UEA en (Belgio 000-1631831-97;
Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Köln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0 Genève).

☐ el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).

☐ mi ne volas ke mia adreso aperu en la Kongresa Libro.

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO

SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio / peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
uea-membro en kategorio/jaro		BLINDULA KASO
spezfolio n-ro:		DONACO AL KONGRESO
konfirmo de peranto:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	INFANA KONGRESETO
notoj		TRIAMONDA FONDAĴO
		VOLONTULA FONDAĴO
		KOSTOJ (15/21 gld.)
		ENTUTE (en guldenoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handicapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B;

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno).

La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 1998.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 97 12 31 1-a periodo		ĝis 98 03 31 2-a periodo		ekde 98 04 01 3-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. ne individua membro de UEA	280	212	350	265	420	318
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	225	170	280	212	340	255
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	170	128	212	160	255	192
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	112	85	140	106	168	128

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 68 01 01 kaj 77 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

– infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 77 12 31;

– nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): “8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK.”

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**